

≡ V. Inglada ≡

PROZO ↪

Kaj

↪ VERSOJ

PREZO: 2 Frankoj

W
226

PROZO KAJ VERSOJ

*Kolekto da rakontoj, legendoj, versajoj
verkitaĵaj aŭ esperantigitaj*

DE

VICENTE INGLADA



Acetebli ĉe «La Suno Hispana»

◆ ◆ ◆ Cirilo Amorós, 28 ◆ ◆ ◆

VALENCIA



IMPRESA Y LITOGRAFÍA

::: de E. MIRABET :::

MERNÁN CORTÉS, 12.-VALENCIA



LA DRAKEGO DE LA PATRIARĤO

(VALENCIA TRADICIAĤO)

Al mia kara amiko S-ro I. Cogen.

Jen la nomo, per kiu oni konas en Valencio ian drakegon alte elmetitan en la vestiblo de la tiea preĝejo same nomita kaj fondita de la fama piulo Johano de Ribera.

La drakego de la patriarko estas nur krokodilo interne plenigita per pajlo, kiu aperas alnajlita al la apudporda muro de la vestiblo.

Enirinte en la preĝejon, oni tuj ekvidas la drakegon, kiu elmontras teruran vidigon kun sia longa dubeverda korpo, kun siaj larĝaj kaj malglataj kruroj kaj kun sia minaca malfermita buŝego, kvazaŭ preta engluti tuj ĝian rigardonton.

Kion celas la alesto de tiu monstra besto en la Valencia preĝejo? Jen demando malfacile respondebla.

Kelkaj kredas, ke tiu drakego altrudas silenton ĉe la vizitantoj kaj samcele troviĝas aliaj en la Aragonaj temploj por imponi memabstraktiĝon al ĉiuj fervoraj preĝantoj.

Sed tiu klarigo, eble iom naiva por la nuna tempo, ne kontentigis la valencian popolon, kiu de tre longe penis eltrovi la devenon kaj vivadon de tiu fibesto kaj

eĉ kreis pri la afero ian legendon, kiun mi tuj rakontos al miaj karaj gelegantoj, ne forgesante la ĉefajn detalojn de tiu interesa tradiciaĵo, kiu de generacio al generacio estis eldirita kaj konservita malgraŭ la forgesiga kaj engluta efiko de kelkaj centjaroj forpasintaj.

*
**

Estis antaŭ longe, tre longe. Valencio estis tiam nur urbeto, konsistanta el la kvartaloj, kiuj ĉirkaŭas la katedralon. Albufero, vastega laguno, sin etendis de la maro ĝis la alta murego ĉirkaŭbaranta la urbon. La nuntempa Valencio kamparo tiel mirinde fruktodona estis tiam ia multspaca marĉejo da kanoj kaj junkoj: kaj rivero Turjo, nun preskaŭ senakva en sia apudmara kuŝujo, trairis tiam Valencion, kunmiksante sian akvon kun la multenombraj marĉetoj ĉie trovigantaj en la apudajo de la popoldomaro.

Terura ja estis tiu tempo por la timigitaj urbuloj, kiuj elportadis la kruelan tiranecon de la hommanganta monstro. Tie, tre proksime de la urbo, sur apudakva altaĵeto, inter junkaj kunplektaĵoj, en ŝlima, malluma kaj profunda truo, kuŝis la abomena drakego, kiu estis englutinta tiom da senkulpaj homoj; tie vivis la nesatigebla besto, kiu ĉiutage por sin nutri mangegis ĉiujn de ĝi kaptitajn malfeliculojn, tie ĝi restis sur amaso da putrintaj homrestaĵoj, inter duonmangitaj kapoj, dispecigitaj ostoj kaj distranĉitaj membroj.

La pordoj de la Valencio rondmurego restis ĉiam bermitaj; nur iam post iam ili malfermiĝis, kiam ia urbano estis devigita eksteren iri pro ia neprokrastebla bezono.

Sur la ĉirkaŭmurego de la urbo estis ĉiam amaso da

homoj, kiuj observis ĉiujn movojn de la drakego. Dum somero ili vidis ĝin profunde dormantan ekster sia kaŝtuo, ricevante la pleneŝkan radiaron de la bruliga suno. En vintro ĝi ankaŭ eliris el sia loĝejo por varmigi kaj multafoje la terurigitaj valencianoj vidis ĝin avide manĝegantan kelkajn kaptitajn homojn, aŭ rapidantan al sia kaŝejo kun kaptitaĵo en sia multdenta buŝego.

La drakego estis ja la sola penscelo de ĉiuj urbloĝantoj: ĝi maltrankviligis ilian dormadon kaj al ili lasis ĝui nenian trankvilecon. Kion estis farintaj la valencianoj por meriti tian teruran malfeliĉegon? Ĉu eble Dio, en kolera momento, estis sendinta la drakegon, kiel punon por kelkaj multpekuloj aŭ timigon de la malpiuloj?

En la festaj tagoj la junuloj—ĉiam kuraĝaj kaj nesingardemaj—incitis sin reciproke por iri batali kun la drakego. Multajn fojojn ili amase eliris el la urbo, armitaj per hakiloj, lanceoj, glavoj, kaj longaj tranĉiloj, kaj rekte iris al la kaŝtuo por ataki tie la fibeston. Ĝi atendis ilin trankvile kaj malŝate, memfidante al sia supereco, kaj kiam la vivamaso estis jam proksima je kelkaj paŝoj, ĝi rekte, furioze kaj avide ekkuregis al ili, mortmordegis unujn, per ungegoj disŝiris aliajn, kaj la ceteraj timigitaj pro tia buĉado, forrapidis al la urbo, kien ili rifuĝis kontentaj ne esti pereintaj en la batalo.

Ankaŭ la religio volis montri sian helpon al la popolo: iam la urbpastraro aranĝis procesion por mortigi la drakegon kaj fini la aferon per la helpo de Dio. Ian festan tagon eliris el Valencio ĉiuj pastroj en solena kunirado, vestitaj per belegaj ceremoniaj vestoj, provizitaj je sankta akvo kaj latinpreĝoj, kaj sekvitaj de ĉiuj siaj parohanoj. Ili sentime kaj malrapide aliris preĝkantante al la malamika besto, kiu, ekvidinte ilin, iom surpriziĝis en la unua momento pro la stranga vi-

diĝo de lumoj kaj brilaĵoj. Tio ĉi multe kuraĝigis la procesianojn, kiuj kredis certa sian venkon, sed la espero nur momente daŭris, ĉar la drakego tuj rekonsciigis kaj trovante, ke la atakontoj estas simplaj homoj kaj sekve manĝeblaj, ĝi sin tiris antaŭen, malrapide glitante al la procesianaro, kvazaŭ por antaŭsenti la plezurojn de rava kaj neatendita festeno: la valencianoj, komprenante la mortigan danĝeron kaj kaptitaj de neesprimebla teruro, returneniris rapidege kaj senorde al sia urbo, kaj dank' al la flugkureco de ilia reveno, ili savis sin el la dentoj de la monstro.

Ĉiuj rimedoj estis, do, vanaj kontraŭ la malamiko de la popolo: iom post iom la valencianoj kutimis al la sangavideco de la besto, kiel oni kontraŭvole kutimas al neevitebla malfeliĉo: ĉiuj, fine, rezignaciis atendi la saman morton kaj trovi, kiel tombon, la ventron de la drakego.

La popolo rapide malmultnombriĝis kaj en la lasta tempo, ĉar la fibesto renkontis nenian homon marŝantan sur la kamparo, ĝi pasigis plenajn tagojn de malsato, spionante apud la pordoj de la rondmurego la eliron de ia nesingarda popolano.

Tiu terura situacio daŭris kelkajn jarojn kaj igis la loĝantaron vere malfeliĉa; ĝi nur atendis—neniam foriras espero—ke la drakego fine mortos, ĉu post longa maljuneco, ĉu pro malsano, kaŭzita de malbona digestado sekvinta al troa manĝado de homaj korpoj.

Ho se la monstro iam mortus! Kiom da trankvila feliĉo povus tiam ĝui la Valencia popolo! Ĉu estas eble figuri al si alian pli grandan ravenon?

Tiu ĉi iluzio ŝajnis neefektivigebla, ĉar la drakego de tago al tago montris sin pli potenca, pli facilmoŭva kaj manĝegema. La tempo, kiu ĉion detruas, ŝajnis neefika por la fibesto, kiu, bedaŭrinde, aperis ĉiam pli juna kaj supermezure kreskanta.

Tion ĉi rimarkis la popolo kun alarmo ja kompre-

nebla kaj kiam la espero iam sin savi el la drakego, komencis forlasi la koron de la valencianoj, ia neaten-dita okazintaĵo ŝanĝis subite la kutiman staton de la aferoj.

Ia malbonulo, kulpigita pri multaj krimoj kaj for-raboj, estis tiam mortkondamnita de la juĝistaro: post sciigo de la kondamno li sin turnis al la tribunalo kun stranga kaj loga peto: ke oni lin savu el ekzeku-tiĝo, kondiĉe, ke li post kelkaj tagoj mortigos la dra-kegon.

La juĝistaro sin pretigis esplori la demandon por lauleĝe decidi, sed la popolo tumulte montris sian fa-voran opinion por la peto kaj unuvoĉe akceptigis la proponon.

Vere meritis pardonon kaj vivon tiu, kiu estis li-berigonta la popolon el tia longedaŭra kaj terura mal-feliĉego.

La kondamnito postulis nur kelkajn tagojn por sin pretigi al la batalo kun la drakego. La popolo senpa-ciencigis atendente la prokrastitan momenton. Ĝi kon-fidis multe al la promeso de la krimulo kaj esperis de li ion eksterordinaran, ion mirindan kaj sukcesigan. Nur unu afero ŝajnis al ĝi stranga: anstataŭ peti bo-negetrafajn armilojn por la batalo kun la drakego, la kondamnito estis postulinta, ke oni liveru al li multe da brulligno kaj vitraĵo. Ĉiumomente oni al-portadis botelojn, vazojn, k. c. en lian loĝejon, el kiu senĉese eliradis tra la kameno amaso da densa fumo. Kiel povus efiki la vitraĵo kontraŭ la dentoj de la drakego? Por kio, do, la senĉesa brulado? Ĉio ŝajnis mistera kaj nekomprenbla, kaj ĝuste pro tio la po-pola scivolemo pli kaj pli kreskis kaj en la lasta tago sin montris preskaŭ minaca kaj tumulta.

Fine venis la tago difinita por la batalo. Ĝi estis ia festa tago el la monato majo. La suno brilis plej hele kaj la naturo per sia verdeco invitis ĉiujn homojn

al ĝuado de la kampaj plezuroj. Ĉio estis gaja, brila kaj vivplena. Sed per kio povis tio ĉi interesi la valencianojn? Ili nur deziris la mortigon de la fibesto. Por kio taŭgis la bonvetureco, se la popolo devis resti enfermita per la urba rondmurego?

Estis la tria horo posttagmeze, kiam la kodamnito eliris el la malliberejo por plenumi sian promeson. Ĉiuj valencianoj staris sur la rondmurego atendante la momenton de la batalo: gaje babilantaj, nur pritraktantaj en siaj interparoloj la tuj okazontan atakon al la besto, ili faris plej animitajn komentariojn pri la afero. Ĉiuj antaŭsentis ian mirindaĵon kaj la sukceson de la kondamnito. Kiam tiu ĉi eliris la muregan pordon, aplaŭdo ĝenerala lin salutis. Li estis vestita per longa lanrobo kaj nigra kapuĉo kovranta lian kapon: kaj armita nur per granda nefleksebla lanco. La popolo eksentis tiam veran disreviĝon: ĝi atendis ion eksterordinaran kaj vidante, ke la kondamnito aperas en ordinara vesto ĝi eksentis tuj kompaton al li, nova oferoto por la monstro. Kiel li povus, nur per lanco, sin eltiri el la krueleĝeco de la drakego? Mizera malfeliĉulo!...

Li, tamen, kun memfido kaj sentimo iradis rekte al la bestkaŝejo per paŝoj firmaj kaj malrapidaj, kva-zaŭ certa pri sia venko. La drakego estis tre malsata: de du tagoj ĝi estis nemanginta, kaj ĝia furiozeco estis klarvidebla.

Ne povante sin deteni kaj atendi la alvenon de la kuraĝegulo, kiu deziris kun ĝi batali, la fibesto rapidis al li kun buŝo malfermita: la kondamnito, trankvila kaj aplomba, haltis kun lanco en mano, preta sin defendi. Teruraj kaj korpremaj estis tiuj momentoj por la rigardantoj. La drakego estis jam tre proksima de la viro: nur unu sekundo—kaj ĉio finita.

Tamen, kiam engluto de la kondamnito estis por ĉiuj preskaŭ afero efektivigita, ia mirindaĵo okazis: la

robo kaj kapuĉo de la homo defalis kaj li aperis kvazaŭ kolono de fajro brileganta; lia korpo estis tegita per vestaĵo konsistanta nur el vitraj speguletoj, tiel lerte kunmetitaj kaj algluitaj unu al la alia, ke ĝi elĵetis ĉiufanken miljardon da rebriloj trafaj, kiel fulmoj kaj minacaj, kiel flamoj.

La drakego, kiu vidis antaŭ si tian strangan korpon, el kiu rebrilis multegoble la ĉiukoloraj sunradioj kaj sur kiu, ĝi vidis multoble speguligitan sian propran teruran korpegon, unue surpriziĝis, ŝanceliĝis, haltis kaj poste, timigita, komencis malantaŭeniri kun ankoraŭ malfermita buŝego...

Bruega akلامo ekaŭdiĝis: la popolo estis eksplode aplaŭdanta la venkanton. Tiu ĉi ne malprofitis la unuajn momentojn de fortimigo de la besto: li sin ĵetis tuj al ĝi kaj fortege puŝenigis multajn fojojn sian lanco en la buŝegon de la monstro, el kiu komencis flui sango malbonodora kaj malhele ruĝa...

Tuj la rigardantoj alkuris kun siaj armiloj por finmortigi la drakegon: kelkaj senpacience sin ĵetis de la rondmurego por alveni pli rapide: ili mortis pro defalo kaj estis la lastaj oferitoj.

Nenio restas el la vitra vestaĵo de la kondamnito: eble la popolo ĝin disrompis, ĉirkaŭpremante la venkanton en la unuaj momentoj de sia entuziasma eks-citiĝo.

Ankaŭ oni ne scias la nomon de la heroo de tiu tradiciaĵo, kiu per sia lerteco liberigis Valencion de la monstra drakego, sed tiun ĉi oni povas hodiaŭ vidi, alnajtitan al la muro de la vestiblo kun la buŝo malfermita, kvazaŭ preta ripeti la tiamajn kruelegaĵojn.

La rakonto finiĝis, kara leganto; eble vi ne kredas al ĝi, simple ĉar vi, kiel mi mem ankaŭ, ne havis la feliĉon alesti al tiu mirinda okazintaĵo; sed, se vi dubas pri la vereco de tio, kion mi raportis, venu Valencion, iru en la preĝejon de la patriarko kaj tie vi trovos el-

metitan la faman drakegon, kiu ŝajnas altrudi silenton kaj memabstraktiĝon al la multenombraj piuloj, kiuj vizitas la templon por prezenti al Dio sian puran kaj sinceran preĝon.



LA GNOMO

Legendo el G. A. Beequer

La knabinoj de la vilaĝeto revenis de la fonto kun siaj kruĉoj sur la kapo: ili revenis kantante kaj ridante per bruo kaj voĉkriado, kiuj nur estus kompareblaj kun la gaja konfuzpepado de aro da hirundoj, kiam, densaj kiel hajlo, ili flugetadas ĉirkaŭ la ventoflago de sonorilejo.

Ĉe la portiko de la preĝejo apud junipero sidis onklo Gregorio.* Onklo Gregorio estis la plej maljuna persono el la vilaĝeto. Li havis preskaŭ naŭdek jarojn, blankajn harojn, ridan buŝon, gajajn okulojn kaj tremantajn manojn. Dum sia infaneco li estis paŝtisto, dum juneco—soldato; poste li kulturigis malgrandan patroheredan bienon, ĝis, fine, fortoj mankis al li, kaj li trankvile sidigis por atendi la morton, kiun li ne timis, nek deziris. Neniu pli sprite, ol li, rakontis ian ŝercaĵon; neniu, kiel li, sciis pli miregindajn historiojn, nek enkondukis tiel ĝustatempe ian proverbon, sentencon aŭ popoldiron.

Ekvidante lin, la knabinoj akcelis sian iradon en la celo lin alparoli, kaj veninte en la portikon, ĉiuj ko-

* En hispanaj vilaĝoj oni antaŭmetas la vorton «onklo» por alparoli personojn plenaĝajn kaj maljunajn, kiuj havas nenian moŝtan rangon. Sekxe «onklo Gregorio», «onklo Getro», k. c. estas esprimoj malpli respektaj, ol «don Gregorio», «sinjoro Petro» k. t. p. *Rim de la trad.*

mencis pripeti lin, ke li rakontu al ili ian historion, por pli amuze pasigi la tempon ĝis noktigo, tempo ne-longa, ĉar la subiranta suno oblikve sendis al tero siajn elradiojn kaj la montaj ombroj ĉiumomente plidisvastiĝis laŭlonge de la ebenaĵo.

Onklo Gregorio aŭskultis ridetante la peton de la knabinoj, kiuj, ricevinte la promeson, ke li ion rakontos al ili, metis sur teron la kruĉojn, kaj sidigante ĉirkaŭ lin, aranĝis rondon, en kies centro restis la maljunuleto, kiu komencis paroli jenmaniere:

—Mi ne rakontos al vi historion, ĉar malgraŭ ke mi kelkajn en tiu ĉi momento rememoras, ili rilatas tiel gravajn aferojn, ke vi, petolulinoj, ne estus atentaj por ilin aŭskulti, nek al mi, pro proksimeco de noktigo, restus tempo por ilin raporti. Mi donos al vi konsilon anstataŭe.

—Konsilon! ekkriis la knabinoj kun videbla mieno de malbonhumoro. Bah! Ni ja ne haltis por aŭdi konsilojn; kiam ni bezonos, jam ilin liveros al ni sinjoro la pastro.

—Sed, daŭrigis la maljunulo kun sia kutima rideto kaj kaduka tremanta voĉo, eble sinjoro la pastro ne scius en la nuna momento doni al vi konsilon tiel gustrilatan, kiel ja povas onklo Gregorio, ĉar li, okupita pri siaj preĝoj kaj litanioj, eble ne ekrimarkis, kiel mi, ke ĉiutage vi pli frue iras en la fonton preni akvon, kaj ĉiutage vi revenas pli malfrue.

La knabinoj rigardis sin reciproke kun nevidebla mokrideto, kaj eĉ kelkaj, sidantaj post lia dorso, metis fingron sur sian frunton, akompanante tiun faron per signifa gesto.

—Kaj kian malbonon jen vi trovas en tio, ke ni haltas en la fonto por babili kelkatempe kun la amikinoj kaj najbarinoj? diris unu el ili. Ĉu eble oni intermurmuras en la vilaĝeto, ĉar la junuloj iras renkonte al ni sur la vojo por nin amindumi aŭ venas proponi sin volonte

por alporti niajn kruĉojn ĝis la unuaj domoj de la vilaĝeto?

—Jes, tio estas, respondis la maljunulo al la knabino, kiu estis al li parolinta en nomo de siaj koleginoj.— La ĉitieaj maljunulinoj murmuris pri tio, ke nune la knabinoj iras petoli kaj sin amuzi en lokon, kien ili rapide kaj tremante venis preni akvon, tial ke nur el tie oni povas ĝin alporti, kaj mi trovas malbona, ke vi ion post ion perdas la timon, kiun al ĉiuj inspiris la loko, kie staras la fonto, ĉar povus okazi, ke iam en ĝi vin kaptos la noktiĝo.

Onklo Gregorio eldiris tiujn lastajn vortojn per tiel misterplena tono, ke, timigite, la knabinoj malfermis la okulojn por lin rigardi, kaj parte scivoleme, parte moke, ili reinsistis:

—Noktiĝo! Nu, kio dum nokto okazas en tiu loko, ke vi faras tiajn afektajn terursignoj kaj per tiel timigaj, mallklaraj vortoj vi parolas, pri kio povus al ni tie okazi? Ĉu eble formanĝos nin la lupoj?

—Kiam monto Monkajo kovriĝas per neĝo, la lupoj pelitaj el siaj loĝejoj, are malsupreniras sur ĝiaj deklivaĵoj, kaj pli ol unu fojon ni aŭdis ilin kriegantajn en terura koncerto, ne sole en la ĉirkaŭaĵo de la fonto, sed en la stratoj mem de la vilaĝeto; tamen, la lupoj ne estas la plej teruraj loĝantoj de Monkajo; en ĝiaj profundaj kavaĵoj, en ĝiaj suproj malglataj kaj senhomaj, en ĝia kava internaĵo, vivas iaj diablaj spiritoj, kiuj, dum nokto malsupreniras amase sur ĝiaj krutaĵoj kaj enplenigas la aeron, sin movas sur la ebenaĵo kiel formikaro, saltadas de roko al roko, ludas en akvo aŭ balancas sin sur la senfoliaj arbobranĉoj. Ili estas, kiuj kriegas en la fendoj de ŝtonegoj; ili—kiuj formigas kaj forpuŝas tiujn grandegajn neĝobulojn, kiuj rule subiras de la altaj montpintoj, renversas kaj subpremezas ĉion, kion ili pasante renkontas; ili estas, kiuj per kajlo frapas niajn vitraĵojn en pluvaj noktoj kaj kuradas sur la marĉosu-

praĵoj, kiel flamoj bluaj kaj malpezaj.—Tiuĵ spiritoj, kiuj pelitaj el ebenajoj per la preĝoj kaj forĵuroj de eklezio iris rifuĝi sur la neatingeblajn suprojn de montaro, estas diversnaturaj kaj ŝajne aperas al niaj okuloj sub malsamaj formoj. Tamen, tiuj estas la plej danĝeraj, kiuj plej dolĉeglite eniras per plaĉaj vortoj la koron de junulinoj kaj ilin miregigas per brilegaj promesoj, tio estas, la gnomoj. La gnomoj vivas en interno de montoj, konas iliajn subterajn vojojn kaj, eternaj gardistoj de la tie enfermitaj trezoroj, maldormas tage kaj nokte apud la minoj de metaloj kaj ŝtonoj multekostaj. Ĉu vi vidas, daŭrigis la maljunulo signomontrante per sia apogbastono la supron de Monkajo, kiu staris liadekstre, sin elmontranta malluma kaj giganta antaŭ la krepuska ĉielo violkolora kaj nebulombra—ĉu vi vidas tiun grandegan masegon ankoraŭ kronitan de neĝo? Nu, en ĝia interno havas siajn loĝejojn tiuj diablaj spiritoj. La palaco, en kiu ili vivas, estas samtempe terura kaj mirinda. Antaŭ multaj jaroj iu paŝtisto, sekvanta beston erariĝintan, penetris tra la faŭko de unu el tiuj grotoj, kies komencon kovras densaj arbetaĵoj kaj kies finon neniu vidis. Kiam li revenis en la vilaĝeton, li estis pala, kiel morto; li estis neatendite eltrovinta la sekreton de la gnomoj, li estis spirinta ilian venenan atmosferon kaj elpagis per vivo sian kuraĝon; sed antaŭ ol morti li raportis miregindajn aferojn. Irante antaŭen en la interno de la groto, li fine trovis iliajn grandegajn kaj subterajn galeriojn lumigitajn per duba kaj fantazia lumo, kiun naskis fosforlumo de la rokoj, tie similaj al grandaj pecoj el kristalo malfluidiginta laŭ mil formoj kapricaj kaj strangaj. La planko, arkaĵo kaj muroj de tiuj vastaj salonoj, faritaĵo de Naturo, ŝajnis jaspecaj, kiel la plej multekostaj marmoroj, sed la metalvejoj ilin trairantaj estis el oro kaj arĝento kaj inter tiuj brilantaj minvejoj oni vidis, kvazaŭ enmetitaj, multon da grandvaloraj ŝtonoj el

ĉiuj koloroj kaj ampleksoj. Tie estis multamase hiacint-
ŝtonoj, kaj smeraldoj, kaj diamantoj, rubenoj, safiroj
kaj mi ne scias kiom da aliaj nekonitaj ŝtonoj, kiujn li
ne sciis nomi, sed tiel grandaj kaj belaj, ke liaj okuloj
mirkonfuziĝis ilin rigardante. Nenia ekstera bruoj en-
penetris la fundon de la fantazia kaverno; nur oni aŭ-
dis intermite longajn kaj plendajn ĝemojn de la aero
ĉeiranta tra tiu sorĉa labirinto, ian konfuzan brueton
de subtera fajro, kiu kunpremante bolmoviĝis, kaj mur-
muron de kurantaj akvoj, kiu trapasis oni ne scias kie.
Sola kaj erariganta en tiu multvastajo, la paŝtisto ira-
dis mi ne scias kiom da horoj ne trovante la eliron, ĝis
fine li renkontis la lokon, el kie fluis la akvo, kies
murmuron li estis aŭdinta. La akvo elfluis el tero,
kiel mirinda fonto, per saltoj kronitaj de ŝaŭmo kaj
falis formante belvidan kaskadon kaj naskante sono-
ran murmurbrunon, dum ĝi foriris glitante inter la ka-
voj de ŝtonegoj. En ĝia ĉirkaŭo kreskis iaj neniam vi-
ditaj kreskaĵoj, unuj kun folioj larĝaj kaj dikaj, aliaj
kun folioj mallarĝaj kaj longaj, kiel pendantaj ruban-
doj. Duonkaŝitaj en tiu malseka densejo, vagiradis iaj
strangaj estaĵoj: parte homoj, parte rampaĵoj, aŭ sam-
tempe homoj kaj rampaĵoj, ĉar per senĉesa transfor-
miĝo jen ili ŝajnis homaj kreitaĵoj malbelformaj kaj
malgrandaj, jen lumaj salamandroj aŭ flugemaj flamoj,
kiuj rondare dancadis super la pinto de la akvosalto.
Tie, sin agitante ĉiudirekten, kurante sur tero en for-
mo de malplaĉegaj kaj korpotorditaj malgrandeguloj,
rampante sur la muroj, elpelante salivfluon aŭ tordi-
ĝante en figuro de rampaĵoj, aŭ dancante sur la akvosu-
praĵo sub ŝajno de erarlumoj, iradis la gnomoj, mastroj
de tiuj lokoj, elkalkulante kaj transmovante siajn fa-
belajn riĉaĵojn. Ili scias, kien kaŝas la avaruloj tiujn
trezorojn, kiujn vane serĉas poste la heredantoj, ili
konas la lokon, kien la maŭroj, antaŭ ol forkuri, en-
kaŝis siajn juvelojn; kaj la perditajn juvelojn, erarigin-

tajn monerojn, ĉion, kio havas ian valoron kaj malaperas, ili ja serĉas, trovas kaj forrabas por ĝin kaŝi en siajn loĝejojn, ĉar ili la tutan mondon scias subtere iradi per vojoj sekretaj kaj nekonitaj. Tie, do, ili havis senorde kunamasigitajn, ĉiuspecajn objektojn maloftajn kaj multekostajn. Tie estis juveloj de netaksebla valoro, kolaroj, antaŭkolaj ornamiloj el perloj kaj delikataj ŝtonetoj; oraj de tre antikva formo amforoj, plenaj je rubenoj; ĉizitaj pokaloj, multekostaj armiloj, moneroj kun bustoj kaj surskriboj, nerekonblaj aŭ nedecifreblaj; fine, trezoroj tiel fabelaj kaj multegaj, ke eĉ la imagado povus aperaŭ ilin kompreni. Kaj ĉio samtempe briladis, ellasante tiajn kolorajn fajrerojn kaj tiel fortajn rebrilojn, ke ŝajnis kvazaŭ ĉio brulas, moviĝas kaj tremas. Almenaŭ, la paŝtisto raportis, ke tiel al li ŝajnis. Tion dirinte, la maljunulo momente haltis; la knabinoj, kiuj kun moka rideto komencis aŭdi la rakonton de onklo Gregorio, estis tiam profunde silentaj, atendante lian daŭrigon, kun okuloj mirigitaj, lipoj malfermetitaj kaj vizaĝoj elmontrantaj scivolemon kaj intereson. Unu el ili, fine, rompis la silenton, kaj entuziasmigita per la aŭdita priskribo de la fabelaj riĉaĵoj, kiuj prezentigis al la vido de la paŝtisto, ŝi ekkriis ne povante sin deteni:

—Nu, ĉu li nenion el tio alportis?

—Nenion, respondis onklo Gregorio.

—Kia malsaĝulo! hore ekkriis la knabinoj.

—La ĉielo helpis al li en tiu danĝera okazo, daŭrigis la maljunulo, ĉar en la momento, kiam ĉion superreganta avareco komencis forŝovi lian timon, kaj mirlogita per la vido de tiuj juveloj, el kiuj nur unu sufiĉus por lin igi riĉegulo, la paŝtisto estis tuj kaptonta kelkajn el ili, oni diras, ke li aŭdis—miru pri la okazo! —ke li aŭdis klara kaj malkonfuza en tiu profundaĵo, malgraŭ la ridegoj kaj voĉoj de la gnomoj, malgraŭ la bolbruo de subtera fajro, murmuro de kurantaj akvoj

kaj aeraj plendoj, li aŭdis, mi rediras, kvazaŭ li estus apud la malsupro de monteto, kie ĝi troviĝas, la sonoradon de la sonorilo, kiu estas en la ermitejo de nia Virgulino de Monkajo.

Aŭdante la sonorilon, kiu sonoris por Ave-Maria preĝo, la paŝtisto falis teren helpalvokante la Patrinon de nia Sinjoro Jesuo-Kristo, kaj ne sciante kiel kaj tra kie li estis kondukita, li trovis sin ekster tiuj lokoj, sur la vojo al la vilaĝeto, kaj kuŝanta en vojeto, kaptita de granda mirego, kvazaŭ li estus sin eltirinta el sonĝo.

De tiam ĉiuj komprenas kial la fonto de la vilaĝeto alportas kelkafoje en sia akvo ion, kiel glatega polvo el oro, kaj kiam nokto fariĝas, el la brueto, kiun akvo faras, aŭdiĝas konfuzaj vortoj, trompaj vortoj, per kiuj la gnomoj, kiuj infektas ĝin de ĝia naskoloko, penas delogi la aŭdantajn ilin singardemulojn, per promeso de riĉaĵoj kaj trezoroj, kiuj kaŭzos ilian eternan kondamniĝon.

Kiam onklo Gregorio atingis tiun ĉi parton el sia historio, la nokto estis jam alveninta kaj la preĝeja sonorilo komencis sonoradi por la vesperpreĝo. La knabinoj fervore faris la krucosignon, murmurante mallaŭte Ave-Marion, kaj dirinte adiaŭ al onklo Gregorio, kiu ree konsilis, ke ili ne perdu tempon en la fonto, ĉiu reprenis sian kruĉon kaj ĉiuj kune eliris silentaj kaj pripensantaj el la sojlo de preĝejo. Malproksimiĝinte de la loko, kie ili trovis la maljunuleton kaj alvenante en la vilaĝetan placon, el kie ili devis disirii, la plej rapidaga kaj decidema knabino ekkriis:

—Ĉu vi kredas ion el la sencencaĵoj, kiujn al ni rakontis onklo Gregorio?

—Mi, ne! eldiris unu.

—Nek mi! ekkriis alia.

—Nek mi! nek mi! rediris la ceteraj, ridmokante pri sia momentdaŭra kredemo.

La knabina grupo disigis kaj ĉiu el ili malproksimigis en unu direkton sur la placo. Kiam ili estis transirintaj la finangulojn de la diversaj stratoj, kondukantaj en tiun lokon, du knabinoj, la solaj, kiuj ne estis ankoraŭ malfermintaj la lipojn por protesti per siaj ŝercoj pri la veremo de onklo Gregorio kaj kiuj, priokupitaj per la mirinda rakonto ŝajnis penseravataj, foriris kune tra malluma, mallarĝa kaj tordira strateto, kun tia malrapidemo propra ĉe personoj distritaj.

El tiuj du knabinoj, la pli granda, kiu ŝajnis esti ĉirkaŭ dudekjara, nomis sin Martino; la pli malgranda, ankoraŭ ne atinginta la deksekan jaron—Magdaleno.

Dum la tempo, en kiu ili estis irantaj al hejmo, ili ambaŭ profunde silentis, sed kiam ili alvenis en la sojlon de sia domo kaj surmetis la kruĉojn sur la sidŝtonon de la pordo, Martino diris al Magdaleno:—Nu, ĉu vi kredas pri la mirindaĵoj de Monkajo kaj pri la spiritoj de la fonto?..... —Mi, respondis Magdaleno simplanime, mi kredas pri ĉio. Ĉu eble vi pridubas?—Ho, ne, rapidis Martino interrompante; mi ankaŭ kredas pri ĉio, pri ĉio..... kion mi deziras kredi.

II

Martino kaj Magdaleno estis fratinoj. Orfinoj de la unuaj infanecaj jaroj, ili mizere vivadis je la protekto de ia parenfino el sia patrino, kiu pro kampato estis ilin hejmakuptinta, kaj kiu cuimomente sentigis ilin per siaj riproĉdiroj, kaj humiligaj vortoj la pezon de sia bonfaro. Ĉio ŝajnis hunkhelpi al plifortigo de la amaj kunrilatoj inter tiuj du animoj frataj, ne sole pro la sanga samligilo, sed ankaŭ pro tiuj de mizero kaj suferado, kaj tamen inter Martino kaj Madaleno ekzistis ia silenta kouknrenco, ia sekreta antipatio, kuin nur povus klarigi la studo pri iliaj karakteroj, tiel absolute kontraŭaj, kiel iliaj tipoj.

Martino estis malhumila, flamiĝema en siaj inkli-
noj, kaj ŝovaĝe maldelikata por la elmonro de siaj kor-
sentoj; ŝi sciis nek ridi, nek plori: tial ŝi estis neniam
plorinta, nek ridinta. Magdaleno estis, kontraŭe, humi-
la, amanta, bonkora, kaj pli ol unu fojon, oni vidis ŝin
samtempe plorantan kaj ridantan, kiel infano.

Martino havis okulojn pli nigrajn, ol nokto, kaj oni
dirus, ke el inter ŝiaj mallumaj okulharoj intermite
saltadis fajreroj, same kiel el arda karbero.

La blua pupilo de Magdaleno ŝajnis naĝi sur luma
fluaĵo interne de la ora ĉirkaŭo de ŝiaj blondaj okulha-
roj kaj en ili ĉio estis harmonia kun la diversa esprimo
de ŝiaj okuloj. Martino, korpomaldika, malhelkolora, gra-
cie altkreska, rigidmova, kun mallumaj kaj naturfrizitaj
haroj, kiuj ombroverŝis sian frunton kaj pendis sur ŝiaj
ŝultroj, kiel velura mantelo, formis strangan kontraston
kun Magdaleno, blanka, rozkolora, malgranda, infane-
ca en siaj fizionomio kaj formoj kaj kun blondaj har-
plektaĵoj, kiuj ĉirkaŭis ŝiajn tempiojn, similaj al ora
konturo de la kapo de anĝelo.

Malgraŭ la neklarigebla repuŝo, kiun ili sentis unu
kontraŭ la alia, la du fratinoj estis ĝis tiam vivintaj en
ia speco de indiferenteco, kiun oni povus konfuzi kun
paco kaj koramo; ili estis havintaj, nek inter si divido-
tajn karesojn, nek envidtajn preferojn; egalaj en mal-
feliĉo kaj doloro, Martino estis sin enkaŝinta por suferi
en egoistan kaj malhumilan silentadon; kaj Magdaleno
trovinte seka la koron de sia fratino, ploradis solece,
kiam la larmoj nevole amasalvenis al ŝiaj okuloj.

Nenia sento estis komuna inter ili; neniam ili estis
konfidintaj unu al la alia pri siaj ĝojoj kaj malĝojoj, kaj
tamen la solan sekreton, kiun ili penis plej profunde
kaŝi en la koro, ili estis reciproke divenintaj per tiu
mirinda instinkto de la enamita kaj jaluza virino. Mar-
tino kaj Magdaleno amcelis efektive unu saman viron.

Ĉe unu, la pasio estis la malceda deziro, devenanta

de karaktero neperfortebla kaj nur volanta sian kapricon; ĉe la dua, la amo similis al tiu vaga kaj propramo-va karesemo de la junuleco, kiu, bezonante ian objekton al kiu sin doni, amas la unuan, kiu al ĝi prezentigas. Ili ambaŭ eltenis la sekreton pri sia amo, ĉar la viro, kiu estis ĝin inspirinta, eble mokmalsatus tiun amon, kiu povus esti interpretata, kiel ambicio absurda ĉe malnobelaj kaj malfeliĉaj knabinoj. Ili ambaŭ, malgraŭ la interspaco, kiu apartigis ilin de la celo de sia amado, nutris ian malproksiman esperon ĝin atingi.

Apud la vilaĝeto kaj sur altaĵo, kiu superstaris la ĉirkaŭaĵon, estis ia antikva kastelo, forlasita de siaj mastroj. En la kunvenaj vesperoj la maljunulinoj rakontadis pri ĝiaj fondintoj ian historion plenan de mirindaĵoj. Ili raportis, ke iam la reĝo de Aragono trovante sin en milito kontraŭ siaj malamikoj, kun siaj rimedoj elĉerpitaj, forlasita de siaj partianoj kaj perdonta tuj la tronon, ricevis la viziton de tiea paŝtistineto, kiu, elkovrinte al li la ekziston de iaj subteraj vojoj, laŭ kiuj li povis trairi Monkajon, tute ne rimarkite de la malamikoj, ŝi transdonis al li trezoron da delikataj perloj, tre multekostaj ŝtonoj, kaj longaj pecoj el oro kaj argento. La reĝo pagis per ili siajn servaĵojn, aranĝis potencan armeon, kaj marŝante sub tero dum unu tuta nokto, atakis la sekvantan tagon siajn kontraŭulojn, ilin disvenkis kaj firmigis la kronon sur sia kapo.

Atinginte tian faman venkon, la reĝo—oni rakontas—diris al la paŝtistineto:

—Petu de mi kion ajn kaj eĉ se ĝi estus la duono de mia reĝlando, mi ĵuras, ke mi tuj ĝin transdonos al vi.

—Mi nur volas reiri zorgi mian brutaron, respondis la paŝtistineto.—Vi zorgos, sed nurmian landlimon, rediris la reĝo, kaj li transdonis al ŝi la apudfremdan distrikton kaj ordonis konstrui por ŝi fortikaĵon en la urbo plej proksima de Kastilujo, kien la paŝtistino

translogiĝis, jam edziniĝinta kun unu el la reĝaj favoratoj, nobela, belkreska, brava kaj ankaŭ mastro de multaj fortikajoj kaj landetoj.

La miregiga rakonto de onklo Gregorio pri la gnomoj de Monkajo, kies sekreto estis en la vilaĝeta fonto, denove ekscitis la frenezajn imagojn de la du enamitaj fratinoj, kaj alplenigis, por tiel paroli, la forgesitan historion pri la trezoro trovita de la fabela paŝtistineteto; trezoro, kies rememoro estis pli ol unu fojon malkvietiĝinta ilin dum la noktoj de sendormo kaj maldolĉeco, aperante al ilia imagado, kiel malforta espera lumradio.

En la vespero tuj sekvanta al renkontiĝo kun onklo Gregorio, ĉiuj knabinoj de la vilaĝeto konversaciis en siaj demoj, pri la miregiga historio, kiun li estis al ili rakontinta. Martino kaj Magdaleno profunde silentadis, kaj nek en tiu vespero, nek en la tuta sekvanta tago ili denove diris unu al alia eĉ solan vorton, rilate al tiu afero, temo de ĉiuj konversacioj, kaj celo de la komentarioj de iliaj najbarinoj.

Kiam alvenis la kutima horo, Magdaleno prenis sian kruĉon kaj diris al sia fratino:—Ĉu ni iros al la fonto?—Martino ne respondis kaj Magdaleno denove al ŝi diris:—Ĉu ni iros al la fonto? Atentu, ke se ni ne rapidos, la suno subiros, antaŭ ol ni revenos.—Martino ekdiris fine per mallongaj kaj malafablaj vortoj:—Mi ne volas iri hodiaŭ.—Nek mi ankaŭ, aldiris Magdaleno post silenta momento dum kiu ŝi tenis la okulojn fiksitajn al la okuloj de sia fratino, kvazaŭ dezirante per ili diveni la kaŭzon de sia decido.

III

La knabinoj de la vilaĝeto estis jam hejmen revenintaj de preskaŭ unu horo. La lasta krepuska lumradio estis en horizonto estingiĝinta kaj la nokto komen-

cis sin montri ĉiumomente pli malluma, kiam Martino kaj Magdaleno, reciproke pristeliginte, eliris el la vilaĝo, ĉiu laŭ malsama vojo, kaj sin direktis al la mistera fonto. La fonto elfluis kaŝita inter malglataj ŝtonoj, kovritaj de musko, ĉe la fundo de longa aleo. Kiam iom post iom ĉiuj tagaj bruetoj estis estingigintaj kaj jam ne estis audiganta la malproksima voĉo de la kamparanoj, kiuj revenadis rajdante sur siaj laborbestoj kaj kantante laŭtakte de la surtere trenata direktilo de plugilo, kiam tute ĉesis la unutona bruo de la brutaj tintiletoj, kaj la voĉoj de paŝtistoj kaj la bojado de hundoj, kiuj kunvenigas la brutarojn, kaj aŭdigis el vilaĝeta turo la lasta sonoro de vesperpreĝa sonorado, tiam ekregis tiu duobla kaj solena silento de nokto kaj soleco; silento plena de strangaj kaj mallaŭtaj murmuroj, kiuj igas ĝin ankoraŭ pli sentebla.

Martino kaj Magdaleno ŝoviris laŭ-inter la labirintaj arboj kaj ŝirmataj de mallumeco alvenis en la finon de la aleo, ne vidinte unu la alian. Martino ne sciis timon kaj ŝiaj paŝoj estis firmaj kaj sensanceliĝaj. Magdaleno trenadis nur pro la bruo, kiun faris ŝiaj piedoj surpasante la sekajn arbfoliojn, kiuj tapete kovradis la teron. Kiam la du fratinoj troviĝis apud la fonto, la nokta vento komencis ŝanceli la supron de la poploj kaj al murmurado de ĝiaj malegalaj blovoj ŝajnis respondi la fluanta akvo per sia murmuro laŭtakta kaj unuforma.

Martino kaj Magdaleno atentis tiujn bruojn, kiuj pasadis sub iliaj piedoj kvazaŭ konstanta mallaŭtaĵo, kaj super iliaj kapoj, kvazaŭ plendo, kiu naskiĝis kaj estingiĝis por denove kreski kaj disvastiĝi tra la arbdensejo. Dum la tempo pli forkuradis, tiu ĉiama sonado de aero kaj akvo komencis fari al ili ian strangan eks-citecon, kvazaŭ kapturniĝon, kiu konfuzante ilian vidon kaj zumante en iliaj oreloj, ŝajnis tute ilin senskonsciigi. Tiam, laŭ maniero, per kiu en sonĝo oni

aŭdas paroli kun malproksima kaj konfuza eĥo, ŝajnis al ili aŭdi inter tiuj bruetoj sen nomo, iajn sonojn mallerte elparolitajn, kvazaŭ de infano, kiu volas kaj ne povas alvoki sian patrinon: poste, vortojn, kiuj ripetigis unu kaj alian fojon ree, ĉiam same; poste frazojn sen kunrilato, malarangitaj, sen ordo, nek senco, kaj fine... fine komencis paroli la vento vaganta tra la arboj kaj la akvo saltanta de ŝtonego-ŝtonegon: kaj ili tiel paroladis.

LA AKVO

Virino!... virino!... aŭdu min... aŭdu min kaj apudvenu por min aŭdi, mi kisas viajn piedojn, dum mi tremos kopiante vian figuron en la ombra fundo de mia ondaro. Virino!..., aŭdu min, ĉar miaj murmuroj estas vortoj.

LA VENTO

Knabino!... gracia knabino, levu vian kapon, lasu min pace alkisi vian frunton, dum mi ŝanceletas viajn harojn. Gracia knabino, aŭskultu min, ĉar mi ankaŭ scias paroli kaj en vian oreton murmuros karesajn frazojn.

MARTINO

Ho parolu, parolu, ke mi vin komprenos, ĉar mia pensado naĝas en rapidturniĝo, kiel naĝas viaj sendecidaj vortoj!

Parolu, akvofluo mistera.

MAGDALENO

Mi timas. Nokta aero, bonodora aero, malvarmetigu mian brulantan frunton! Diru ion, transdonontan al mi kuraĝon, ĉar mia animo ŝanceliĝas.

LA AKVO

Mi trairis la malluman internon de la tero, mi aza

tendite penetris la sekreton de ĝia mirinda fruktodoneco kaj konas la fenomenojn de ĝia profundajo, kie elĝermas la estontaj kreitaroj.

Mia brueto dormigas kaj elvekas: vekigu vi, kiu ĝin komprenas.

LA VENTO

Mi estas la aero, kiun, traŭrante la spacon, movigas la anĝeloj per siaj grandegajflugiloj. Mi okcidenten amasigas la nubojn, kiuj proponas al la suno purpurkoloran liton kaj mi alportas, dum tagigo, kun la densa nebulo disturniganta en gutojn, pluvon da perloj sur la florojn. Balzamo estas mia ekĝemo, malfermu al mi vian koron kaj mi ĝin superversos per feliĉo.

MARTINO

Kiam mi unufoje ekaŭdis la murmuron de subtera akvofluado, ne vane mi min almetis al tero atentante ĝin per aŭdo. Kun ĝi fluis mistero, kiun mi estis fine komprenonta.

MAGDALENO

Ventaj ekĝemoj, mi vin konas; vi karesadis min dormantan, kiam de plorado lacigita, mi, infanino, min fordonis al dormo, kaj via murmurado ŝajnis al mi la vortoj de patrino, dorlotanta sian filinon.

La akvo mutigis dum kelkaj momentoj, kaj sonis nur, kiel akvo inter ŝtonegoj rompiĝanta. Ankaŭ la vento silentigis kaj ĝia bruo nur estis bruo de folioj trablovitaj. Tiel pasis kelka tempo, kaj ili poste parolis ree, kaj tiamaniere parolis.

LA AKVO

Filtriginte guto post guto tra la orbranco de ia nelĉerpebla mino; kurinte sur arĝenta kuŝujo kaj sal-

tinte, kiel sur silikŝtonetoj, inter multenombro da sa-
firoj kaj ametistoj, fortrenante anstataŭ sableroj dia-
mantojn kaj rubenoj, mi kunigis al ia sorĝenio per
mistera kunuleco. Riĉa per ĝia povo kaj la kasitaj efi-
koj de la multekostaj ŝtonoj kaj metaloj, de kies ato-
moj mi venas saturita, mi povas al vi proponi ĉion,
kion vi ambicias. Mi havas la forton de sorĉagilo, la
povon de talismano kaj la efikon de la sep ŝtonoj kaj
la sep koloroj.

LA VENTO

Mi ĵus vagiris sur la ebenaĵo kaj, kiel abelo reve-
nanta en sian loĝejon kun sia kaptajo de bonodora
mielo, mi alportas virinajn ekĝemojn, infanajn pet-
preĝojn, ĉastamajn vortojn kaj aromojn de nekulturi-
taj nardfloroj * kaj lilioj. Pasante mi nur kaptis bono-
dorojn kaj harmoniajn eĥojn; miaj trezoroj estas nema-
teriaj, sed ili liveras la animan pacon kaj la vagan feli-
ĉon de la ĝojigaj songoj.

Dum ŝia fratino, kvazaŭ sorĉe altirita, sin klinadis
al la fontbordo por pli bone aŭdi, Magdaleno instinkte
sin apartigadis de la ŝtonegoj, inter kiuj la akvo ek-
fluadis.

Ili ambaŭ havis fiksitajn siajn okulojn, unu—al la
akvofundo, la alia—al la ĉiela malproksimo.

Kaj Magdaleno diradis, rigardante la brilantajn
ĉefstelojn:—Tiu estas la lumkonturoj de la nevideblaj
anĝeloj, kiuj nin gardas.

Dume, Martino diradis, vidante sur la akvo de la
fonto, la tremantan rebrilon de la steloj.—Tiu estas la
oraj pecetoj, kiujn la akvo fortrenas dun sia mistera
kurado.

* *nard'* = Kreskajo: hispane, *nardo*; france, *nard*
latine, *nardus*.

La fluakvo kaj la vento, kiuj duafoje estis momente mutiĝintaj, denove parolis kaj diris:

LA AKVO

Supreniru laŭ mia fluo, fortiru de vi la timon, kiel maldelikatan veston, kaj kuraĝu transpaŝi la sojlon de nekoniteco. Mi divenis, ke via spirito estas samesenca, kiel la superaj spiritoj. Eble la envio forĵetis vin el la ĉielo por enŝlimigi vin en la koton de mizero. Mi, tamen, vidas sur via malluma frunto ian malhumilan restosignon, kiu vin igas inda je ni, fortaj kaj liberaj spiritoj Venu, mi tuj instruos vin pri magiaj vortoj tiel efikaj, ke nur per ilia elparolo, la rokoj malfermiĝos kaj oferproponos al vi la diamantojn, kiuj kuŝas en ilia interno, kiel en konkolo la perloj, kiujn fiŝkaptistoj eltiras el la marfundo. Venu, mi donos al vi trezorojn, por ke vi vivu feliĉe; kaj poste, kiam disrompiĝos la malliberejo, vin enfermantan, via spirito similigiĝos al la niaj, kiuj estas homaj spiritoj, kaj ni ĉiuj kunigitaj estos la movila forto, la viva potencago de kreitajaro, kiu rondiras kiel fluajo tra ĝiaj subteraj arterioj.

LA VENTO

Akvo lekas la teron kaj vivas en la koto: mi diskuras tra la eteraj landoj kaj flugas en la senlima spaco. Obeu al viaj korinklinoj, lasu, ke via animo supreniru, kiel la flamo kaj la bluaj fumospiraloj. Malfeliĉo al laflugilhavanto, kiu malsupreniras en la profundaĵojn por serĉi oron, kiam li povas alten sin levi por trovi amon kaj senton!

Vivu nerimarkita, kiel violo; mi ja portos al vi per fruktodona kiso la vivigan ĝermon de alia floro, via fratino, kaj mi traŝiros la nebulojn, por ke ne manku al vi ia sunradio lumigonta vian gajecon. Vivu neri-

markite, kaŝite, kaj kiam via spirito sin deligu, mi ŝuprenportos ĝin en ruĝa nubo al la landoj de lumo.

La akvo kaj la vento silentiĝis kaj la gnomo aperis. La gnomo estis, kvazaŭ hometo diafana: ia speco de luma malgrandegulo, simila al erarfajro, kiu ridegis sen bruo kaj saltadis de ŝtonego al stonego, kapturnigante per sia rapidega moviĝemo. Iajn fojojn li subenigis en akvon kaj daŭrigis brilante en ĝia fundo, kiel milkolora juvelo el ŝtonetoj; aliajn fojojn li eliris tra la supraĵo, baraktis piede-mane, kaj skuadis flanken kaj reflanken sian kapon, kun rapideco, kiu ŝajnis mirindaĵo.

Martino ekvidis la gnomon kaj sekvadis ĝin per erariĝanta rigardado en ĉiuj ĝiaj strangaj elturniĝoj; kaj kiam la diabla spirito ekkuregis fine laŭ inter la krutaĵoj de Monkajo, kiel rapidanta flamo, kiu agitas sian fajreran hararon, ŝi sentis ian specon de nekontraŭtebla altiĝo, kaj sekvis post lin kun freneza kuregado.

Magdaleno! dume diradis la aero, malrapide foriranta; kaj Magdaleno paŝo post paŝo, kiel dormaganta virino, gvidata dum dormo de ia amika voĉo, postiris la ventblovon, kiu iris ekĝemante sur la ebenaĵo.

Post tio, ĉio denove silentiĝis en la malluma aleo, kaj la vento kaj akvo daŭrigis resonante per la ĉiamaj murmuroj kaj bruetoj

IV

Magdaleno revenis en la vilaĝeton pala, kaj mirigita. Martinon oni vane atendis dum tuta nokto.

Kiam alvenis la antaŭvespero de la sekvanta tago, la knabinoj trovis rompitan kruĉon, en la bordo de la

alea fonto. Ĝi estis la kruĉo de Martino, pri kiu neniam sciis poste. De tiam la vilaĝetaj knabinoj iras ĉerpi akvon tiel frue, ke ili matenvenas kun sunleviĝo. Kelkaj certigis min, ke dum nokto oni aŭdis pli ol unu fojon la ploradon de Martino, kies spirito vivas kapttenita en la fonto. Mi ne scias kiel kredi al tiu ĉi lasta parto de la historio, ĉar nur vero estas, ke de tiu tempo neniu por aŭdi la ploron kuraĝis penetri en la aleon post la sonorado por Ave-Maria preĝo.

EDZIĜO MALARANĜITA

aa

TERURA NEKOMPRENIGO

TEDA DIALOGO

en unu sceno ... kaj kelkaj bastonbatoj.

*Dediĉita al mia tre kara
amiko S-ro Aŭgusto Jiménez
Loira.*

- - - PERSONOJ - - -

S-RO PASERKAPO, 50-jara, kuracisto, dramaŭtoro, agento de ia amerika societo de asekuroj kaj patro de *Fr-ino Kabineto* (inter parentezo, tiu ĉi fraŭlino havas nenian rilaton, nek parencecon kun la eminenta pola Esperantisto, S-ro Kabe).

S-RO TIMOPLENA, 28-jara, advokato kaj amanto de *Fr-ino Kabineto*.

EDZIĜO MALARANĜITA

aŭ

TERURA NEKOMPRENIĜO

Skriboĉambro en la domo de S-ro Paserkapo kun ambaŭflankaj pordoj. Estas nokte kaj tamen ne pluvas. S-ro Paserkapo skribas sur granda kaj malnova tablo kun ~~intereso~~ pli granda ankoraŭ, ol sia tablo, sed ne tiel malnova. Iam post iam li haltas kaj profunde pensas. Oni ne scias, ĉu li skribas ĉapitron de siaj memorskriboj aŭ simplan kopion de kalkulo por ia malfeliĉa kliento. Apud li, sur tre dike remburita apogseĝo ia nigra kato dormas, tiel profunde kvazaŭ ĝi estus ĵus traleginta tutan Eneidon, aŭ almenaŭ unu jarkolekton de Internacia Scienca Revuo. Sinjoro Timoplana aperas ĉe la maldekstra pordo kun ĉapelo en unu mano kaj bastono en la alia. Ĉar li estas tre miopa li eniros malrapide paŝante, kvazaŭ li timus faleti: iom helpas al lia timo la cirkonstanco, ke la ĉambro ne estas sufiĉe lumigita.

S-ro Timoplana (farante profundan riverencon).

Sinjoro...

S-ro Paserkapo

Eniru, sinjoro.

S-ro Timoplana (enirinte)

Pardonu, se mi...

S-ro Paserkapo

Bonvolu sidigi...

S-ro Timoplana

Dankon, sed...

S-ro Paserkapo

Sidigu vin, mi petas.

S-ro Timoplana

Sinjoro, mi ne kuraĝas...

S-ro Paserkapo (vidante, ke la vizitanto iom ŝanceliĝas por sidigi aldiras afable kaj malrapide)

Havu la bonecon eksidi!

(S-ro Timoplana audante trian elegantan petdiron por sidigo (tio ne estas reklamo S-ro H. H!) decidas fine sidigi sin, aŭ sidigi aŭ eksidi. Sed li senatente sidigas sur la seĝon, kie dormas la kato. Tiu ĉi eksentante neatenditan pezpremon vekigas kun timo, kaj kredante, ke sur ĝin falis patro Eneo kaj ĉiuj el sagoj Danaaj savitaj Trojanoj, terure miaŭas kaj sin eltiras barakte el sub la eksidanta korpoparto de S-ro Timoplana.)

S-ro Paserkapo (plej multe penante por ne ekridegi.)

Sinjoro, tio...

S-ro Timoplēna (konfuzegita)

Ho, la malfeliĉa besto! Pardonu, sinjoro, pro mia ne-
atentemo. Mi ja ne vidis la katon. Ĉar oni diras ke
nokte ĉiuj katoj estas grizaj, kaj ĝi estas pli nigra, ol
konscienco de procentegulo...

S-ro Paserkapo

Tio estis bagatelo. Ne parolu plu pri ĝi kaj bonvolu
residiĝi.

S-ro Timoplēna (residiĝas iom post
iom kaj daŭrigas konfuzita).

Kvankam vi ne havas la honoron min koni... ho
pardonu, sinjoro; kvankam mi ne havas la honoron, ke
vi min konas, mi venas al vi,... sed mi timas, ke mi
interrompis ian gravan laboron, faratan de vi, kiam
mi eniris.

S-ro Paserkapo

Ne ĝenu vin pro tio. Ĝi estas ja negrava afero. Mi
sukcesis hodiaŭ, ke riĉa grafo akceptis multvaloran de
mi proponitan asekuron: tial, mi sentis min tre gaja
kaj kiam vi venis, mi estis verkanta la trian scenon de
la dua akto de mia tragedio: «La malespero de du ju-
naj geamantoj.» Sed kredis al mi, tiu sceno estas plej
malgrava: en ĝi nur mortas ia ftizulino kaj du kavali-
roj duelas tuj post tiu okazo.

S-ro Timoplēna

Kaj vi nomas tiun scenon malgrava? Aŭtoro mo-
desteco!

S-ro Paserkapo

Ĉiuj aferoj estas rilataj. Por mia tragedio unu mortigo kaj alia duelo estas bagatelo. En la sesa akto, oni prezentas la agonion de tuta urbo mortanta pro malsato, kaj en la lasta....

S-ro Timoplana (ŝercete)

Eble mortas la sufloro kaj la publiko?

S-ro Paserkapo

Ne, sinjoro, ne trograndigu. La lasta akto okazas en tombejo kaj...

S-ro Timoplana (timante aŭdi terurran rakonton).

Ne daŭrigu, mi petas. Se vi antaŭsciigos min pri la fino, eble la tragedio perdos por mi iom da intereso kaj mi volas ĝui ĝin tutan en ĝia unua prezentado; kompreneble, mi esperas ke vi diros al mi kiam kaj kie prezentigos... (flanken: certe por ne iri en la teatron!)

S-ro Paserkapo

Mi havos tiun plezuron. Mi kredas, ke mia tragedio faros grandan impreson...

S-ro Timoplana (flanken)

(Ĝi ja faros teruregan impreson: se vi aperas en ĝi kiel ekzekutisto de la tuta homarol..)

S-ro Paserkapo

Sed ni lasu tiun aferon, sinjoro. Mi ankoraŭ ne scias al kio mi ŝuldas la plezuron de via vizito.

S-ro Timoplana

Pardonu, ke mi ankoraŭ ne parolis pri tio, sed la afero estas tiel embarasiga...

S-ro Paserkapo

Parolu sincere kaj sentime: inter honestaj viroj la komplimentoj estas superflujaj.

S-ro Timoplana

Ha, sinjoro, mi dankas vian afablecon, sed mia celo estas tiel delikata, ke...

S-ro Paserkapo

Eble vi venas sciigi min, ke mia asekura kompanio neatendite bankrotis?

S-ro Timoplana

Ne, sinjoro.

S-ro Paserkapo

Aŭ eble vi venis por diri al mi, ke mia mortinta bopatrino ĵus reviviĝis?

S-ro Timoplana

Ne, tute ne; mi ne havis la honoron koni vian bopatrinnon; sed se ŝi mortis, vi povas resti trankvila, ĉar ŝi neniam venos vin ĝeni.

S-ro Paserkapo

Mi ankaŭ opinias tutsame; mi asistis ŝin dum ŝia lasta malsano, kaj mi povas certigi vin, ke ĉiuj miaj mortin-

taj klientoj, estas ja plej vere mortintaj; kiam la povo de mia scienco ne sukcesis eltiri iun el mortmalsano, kredo lin tute mortinta...

S-ro Timoplana (flanken)

(Kaj eble okazas same kiam vi sukcesas. Dio gardu min fali, malsana, en viajn manojn!)

S-ro Paserkapo

Vi ne venis por sciigi min pri bankroto de mia kompanio, nek pri reviviĝo de mia bopatrino: eble, vi, do, venis por peti de mi monon?

S-ro Timoplana

Tute ne, sinjoro.

S-ro Paserkapo (flanken)

(Mi libere spiras!) (Laŭte) Tre bone, mia sinjoro, volu jam paroli pri kio ajn cetera, en la certeco, ke vi ne faros al mi malplezuron.

S-ro Timoplana

Ĉar via boneco tiel multe min kuraĝigas, mi parolos al vi pri mia afero sen elturnoj, nek ĉirkaŭfrazoj: tute rekte en la celon.

S-ro Paserkapo

Sed finu je mil diabloj kornaj kaj vostaj!

S-ro Timoplana (iom mallaŭtigante sian voĉon).

Mi, venas nur por via Kabineto.

S-ro Paserkapo

Por mia kabineto?

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro, mi amas vian Kabineton.

S-ro Paserkapo

Sed, ĉu vi ne scias, ke mia kabineto estas plej bezona por mia vivado kaj estas por mi preskaŭ neapartigebla kunulo? Forprenu mian kabineton kaj mi velkos, kiel floro al kiu mankas suno kaj akvo.

S-ro Timoplana

Tio estas tre atentinda, sed mi amegas vian Kabineton.

S-ro Paserkapo

Al mia kabineto, eble, mi ŝuldas, mia kara sinjoro, la sukceson de miaj teatraj verkoj. Vi, do, povas ja figuri al vi, kian oferon vi postulas. Tamen, ŝajnas al mi, ke la afero estas facile solvebla. Ni ambaŭ uzu mian kabineton, ni kune laboru...

S-ro Timoplana

Kiel, sinjoro! Ĉu mi aŭdis bone? Ke ni ambaŭ uzu vian filinon?

S-ro Paserkapo

Kiu parolis pri mia filino? Mi simple aludis mian

ĉambbron. Se vi estus dirinta: «fraŭlino Kabineto», la afero estus alia. Bone, ni rekomencu la demandon. Kion vi volas pri mia filino?

S-ro Timoplana

Mi petas ŝian manon.

S-ro Paserkapo

Kiun manon, la dekstran aŭ la maldekstran?

S-ro Timoplana

Kiel, sinjoro! Ĉu eble vi ŝercas? Kompreneble, ambaŭ manojn!

S-ro Paserkapo

Dank'al Dio, ŝi havas du manojn, kiel ordinare okazas ĉe ĉiuj virinoj. Kaj ŝiaj manetoj estas plej lertaj. Sed por kio vi volas la manetojn de mia filino Kabineto? Ĉu ili taŭgas al vi por io?

S-ro Timoplana (senpacienca)

Estas eble, ke vi ankoraŭ ne bone komprenis mian peton? Nu, sinjoro, mi nur deziras edziĝi kun ŝi, fariĝi ŝia edzo. Ĉu nun mi klare min esprimas?

S-ro Paserkapo

Plej klare, mia kara. Se vi estus nur dirinta: «edziĝo», mi estus tuj via kompreninta. Bone, ni parolu pri via edziĝo. Ĉu mia filino scias, ke vi ŝin amas?

S-ro Timoplana

Mi kredas, ke ne. Eble ŝi ne min konas. Mi vidis

ŝin nur du fojojn, kaj en la unua mi eksentis al ŝi profundan subitamon. Ĝi estas tiel ĉarma persono...

S-ro Paserkapo (interrompante)

Per sono?

S-ro Timoplenu (malrapide elparolante).

Jes, per-sono! Ĉu mi diris ion eksterordinaran aŭ nedecan?

S-ro Paserkapo

Ne, sinjoro, sed dirante «per sono», ŝajnas, ke vi ŝatas mian filinon Kabineton kvazaŭ ŝi estus ia violono aŭ alia instrumento.

S-ro Timoplenu

Nun, sinjoro, mi estas, kiu ne komprenas. Kian rilaton povas havi kun mia edziĝo la violo, nek ĝiaj onoj? Kaj por kio vi nomas la instruan menton? Ĝis nun mi ne sciis, ke mento taŭgas por instrui, sed—diablo ĝin prenu—vi, kuracistoj, estas kapablaj eltrovi la plej mirindajn ecojn de ĉiu aparta aĵo.

S-ro Paserkapo

Sinjoro, ŝajnas al mi, ke ni iom defankiĝas de la afero. Ĝu vere vi deziras edziĝi kun mia filineto?

S-ro Timoplenu

Kun plej honesta celo.

S-ro Paserkapo

Ni parolu, do, serioze pri tiu afero. Mia tuta familio konsistas nur el unu estajo: mia filino. Mi amas ŝin ĝi; frenezo kaj deziras nur ŝian ĉiaman feliĉon. Ĉar ŝia edzinigo estas afero, kiu multe rilatas al ŝia estonta vivo, kaj ankaŭ al la mia, antaŭ ol konsenti pri via peto mi devas unue ekscii, ĉu al mia filino estas agrabla, aŭ ne, via amo.

S-ro Timoplana

Vi estas tre prava. Edzigoj nur devas esti faritaj kun reciproka amkonsento.

S-ro Paserkapo

Kaj antaŭ ol esplori la opinion de mia flineto pri via amo, ŝajnas al mi necese, informi min pri kelkaj aferoj koncernantaj vian profesion, karakteron, inklinojn, k. c. Ĉar mi plej bone konas mian filinon kaj ĝuste scias ŝiajn dezirojn, gustojn, moralajn ecojn, k. c., mi malerare povas juĝi pri la ecoj, kiujn ŝia estonta edzo devas posedi por igi ŝin feliĉa. Ĉu vi konsentos, do, respondi miajn demandojn en tiu celo farotajn?

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro, plej volonte.

S-ro Paserkapo

Bone, ni komencu per la aĝo kaj profesio. Kiun aĝon vi havas kaj kian profesion?

S-ro Timoplana

Mi estas advokato kaj 28-jara.

S-ro Paserkapo

28 jaroj! Kia bela aĝo! Vi povus fari nun tre profitan asekuron je vivo pagante tre malmulte. Ĝuste la kompanio, kies agento mi estas, prezentas por tio plej mirindajn kombinaĵojn. Kaj pri la honesteco kaj seriozeco de mia asekura societo, mi nur devas diri, ke ili estas plej konfidindaj: mi mem estas asekurita. Ĝi estas sendube la plej grava kaj firma kompanio, el ĉiuj ekzistantaj: ĝi havas 2 000.000 da personoj asekuritaj kaj posedas kapitalon je mil milionoj da sterlingaj funtoj.

S-ro Timoplana

Sed, sinjoro mi ne intencas.....

S-ro Paserkapo

Ne ĝenu vin pro tio. Mi plej plezure donas al vi tiujn ĉi sciigojn. Vi diris, ke via aĝo estas 28 jaroj? atentu, kiajn belajn proponojn prezentas al vi mia kompanio. (Li eltiras el la poŝo asekuran kalkullibron, esploras en ĝi, transturnas kelkajn paĝojn kaj daŭrigas). Kioman kapitalon? Ekzemple: 50.000 pesetoj! Por kioma tempo?.... 20 jaroj?.... Bone! 20 jaroj! (S-ro Timoplana vidante perspektive ian longan enuigan raporton, komencas sin movi nerve sur sia seĝo: multafoje li eksentas deziron sendi al la diabloj S-ron. Paserkapon, lian asekuran kompanion kaj ĉiujn belajn proponojn faritajn kaj farotajn, sed pensante pri Fr-ino Kabineto, kiun li vere amas, li rezignacie elportas tian teruran situacion, kun sama malplezuro, kiel tuj ekzekuta mortkondamnito). Vi pagus ĉiujaran kotizaĵon por 1.600 pesetoj. Jen vi havas: ia bagatelo! Kaj se vi havus la feliĉon morti dum la unua jaro.....

S-ro Timoplana

He, sinjoro, mi ne volas esti tiel feliĉa!

S-ro Paserkapo

Ne malkvietigu pri tio; mi parolas nur hipoteze. Se vi mortus dum la unua jaro, via vidvino tuj ricevus 50.000 pesetojn, kaj vi estus nur paginta 1.600! Ĉu oni pavas figuri al si pli belan negocon?

S-ro Timoplana

Certe, ĝi estas tre bela negoco.... por mia edzino. Sed mi preferas vivi multajn jarojn, eĉ nenion *pagante*. Nur la ideo pri mia morto simple starigas miajn harojn.

S-ro Paserkapo (ridante).

Vi, do, timas je morto?... La kompanio ankaŭ deziras ke vi vivadu multajn jarojn. Sed, ni supozu, ke vi vivos almenaŭ 20 jarojn. Vi, do, pagos la 20 kotizaĵojn kaj tuj kiam la 20^a jaro finiĝos, la kompanio proponos al vi: «Ĉu vi volas likvidi vian asekuraĵon? Tiaokaze vi ricevos 35.600 pesetojn, kaj la afero estos tute finita....

S-ro Timoplana

Ne, sinjoro, mi ne volas....

S-ro Paserkapo

Ne? Bone. Ĉu vi preferas daŭrigi vian asekuron? Vi nenion plu pagos, kaj tuj post via morto via vidvino ricevos 60.000 pesetojn.

S-ro Timoplana

Sed, sinjoro, mi nenion.....

S-ro Paserkapo

Bone. Vi eble preferos ricevi renton dumvivan?

S-ro Paserkapo (flanken)

(La diablo vin forprenu, malbenita tedegulo!)

S-ro Timoplana

Tiaokaze, la asekura societo pagus al vi ĉiujare dum via vivo,... atendu, mi petas: 3 kaj 7 faras 10 kaj 8 estas dekok kaj.....

S-ro Timoplana (flanken).

(Mi furiozas!)

S-ro Paserkapo

...Kaj naŭcent

S-ro Timoplana

Ne, sinjoro, tute ne.

S-ro Paserkapo (malpacienca).

Vi estas tre postulema, sinjoro: vi ne volas likvidi vian asekurajon, vi ne deziras ĝin daŭrigi, nek ricevi dumvivan renton. Kion, do, vi volas?

S-ro Timoplana

Mi volas edziĝi kun via filino.

S-ro Paserkapo

Bone, tre bone. ni jam parolos pri tio. Sed, nun permesu, ke mi prezentu al vi alian proponon, kiu eble vin kontentigos. Vi havas jam 28 jarojn. En kiu tago de la nuna jaro vi fariĝis tiomjara?

S-ro Timoplana

En nenia, mia sinjoro.

S-ro Paserkapo

Kiel, sinjoro! Vi eble, naskiĝis en nenia tago?

S-ro Timoplana

Mi naskiĝis la 29^{an} de februaro de ia superjaro kaj ĉar la nuna jaro simple ne estas tia....

S-ro Paserkapo

Tio ne malhelpas. Por mia kalkulo, mi supozos ke via naskotago estas la 1.^a de marto. (Li denove esploras sian libreton). 3 kaj 4 estas sep, kaj....

S-ro Timoplana (ne povante plu elteni).

Sinjoro, haltu, mi petas, aŭ alie via kompanio devos elpagi tuj vian asekuraĵon....

S-ro Paserkapo (mirigita)

Kion vi diras, sinjoro? Ĉu vi frenezigiĝis?

S-ro Timoplana

Mia saĝo estas tute en ordo: almenaŭ mi tion kre-

das, sed bonvolu, ne paroli plu pri asekuroj, nek mortoj, nek kotizaĵoj, nek....

S-ro Paserkapo

Trankviliĝu, sinjoro, la penso pri via estonta morto eble ekscitas vian nervaron....

S-ro Timoplana

Eble, sinjoro, sed ne parolu plu pri asekuroj. Mi ne havas la intencon asekurigi kaj nur la ideo fari kontrakton pri mia vivo aŭ morto, sufiĉas por akceli la venon de tiu ĉi lasta.

S-ro Paserkapo

(Kolere kaj gradige ekscitiĝante)

Kaj vi pretendas edziĝi kun mia filino, vi malamiĝo de asekuraĵoj! Ho ne revu pri tio, sinjoro! Ĝi estas tute nebla!... Ĉu vi scias, kio estas asekuro? Ĝi estas morala antaŭsingardo, certigo pri estonta helpo, evito de terura mizerego, eble trafonta multenombran familion; ĝi estas plej konsoliga....

S-ro Timoplana

Mi tion ne neas; sed en mia situacio, asekuro estas tute superflua....

S-ro Paserkapo

Kiel superflua?

S-ro Timoplana

Jes, superflua kaj tute senutila.

S-ro Paserkapo (flanken kaj furioza)

(Se vi ne havus la intencon edzigi kun mia filino mi jam estus rompinta al vi la kapon, aroganta azeno!)

S-ro Timoplana

Kaj mi tion povas pruvi....

S-ro Paserkapo

Sed vi ne intencas edzigi?

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro.

S-ro Paserkapo

Kaj kredas senutila la asekuron?

S-ro Timoplana

Jen kial. Ni supozu, ke mi jam edzigis kaj estas asekurita.

S-ro Paserkapo

Konsentite.

S-ro Timoplana

Du okazojn ni devas atenti. Unue, ke mia edzino mortos, antaŭ ol mi....

S-ro Paserkapo

Kaj due....

S-ro Timoplana

Ke mi mortos antaŭ ol ŝi.

S-ro Paserkapo

Vi elĵetis la okazon de samtempa ambaŭmortiĝo.

S-ro Timoplana

En la unua okazo, ĉar mia edzino, jam mortis, por kiu, do, estos la asekuraĵo?

S-ro Paserkapo

Kompreneble, por viaj gefiloj.

S-ro Timoplana

Kaj se mi ne havos ilin....

S-ro Paserkapo (iom senpripense)

Tiam, do, por viaj genepoj

S-ro Timoplana (ridegante)

Bela spritaĵo! En la dua okazo, se mi mortas antaŭe....

S-ro Paserkapo (interrompante)

Via edzino ricevos la asekuraĵon, kaj se vi ne estus asekurita, ŝi post via morto, falus eble en mizeron, kun multaj geinfanoj, sen helpo....

S-ro Timoplana

He, sinjoro, vi ne helpus en tiu malfeliĉo al via filino?

S-ro Paserkapo

Plej certe, sinjoro, se mi vivus.

S-ro Timoplana

Kie, do, estas la utilo de mia asekuro?

S-ro Paserkapo

Kaj se mi mortus?

S-ro Timoplana

Tiam via filino ricevus *vian* asekurajon kaj ĉio arangita!

S-ro Paserkapo

(Aŭdante tian neatenditan konkludon restas konfuzita ne sciante kion diri. Li pensas, ke lia estonta bofilo estas ja pli antaŭvida, ol la direktoro mem de lia asekura kompanio, sed ne volante konfesi sian malvenkon, li ektusas, eltiras el sia poŝo naztukon, faras kva-zaŭ li purigas sian nazon kaj fine diras:)

Bone, mi vidas, ke vi estas nun iom ekscitita kaj ne povas senpartie juĝi pri la diskutita demando. Ni lasu ĝin por alia tago, kaj mi daŭrigu la interrompitan demandaron, kompreneble, se vi konsentas.....

S-ro Timoplana

Plej volonte, sinjoro, vi demandu kaj mi penos informi vin pri ĉio.

S-ro Paserkapo

Bone, ni traktu pri viaj gustoj en mangaj deman-

doj. Ni komencu per matenmanĝoj. Kion vi volas preferi ĉiujn matenojn?

S-ro Timoplana

Mi amas, ke oni ne min elveku frue.

S-ro Paserkapo

Mi ne celis tion; mi deziras scii, kiajn matenmanĝojn vi ŝatas? Ĉu vi ŝatas ĉokoladon?

S-ro Timoplana

Se nur ĝi estas densa kaj bongusta.

S-ro Paserkapo

Kun biskvitoj aŭ sen ili?

S-ro Timoplana

Pli bone kun ili: ŝajnas al mi, ke soleco ne taŭgas pri edzo, eĉ por ĉokolado!

S-ro Paserkapo

Kaj la kafon?

S-ro Timoplana

Mi amas ĝin, se ĝi estas pura kaj bone farita. Mi preferas ĝin kun sukero, pli ol sensukeran, kun ia rostita buterpanaĵo, rumo, k. c.

S-ro Paserkapo

Kaj pri la lakto?

S-ro Timoplana

Ne lacigu vin, demandante pri fluidaĵoj: ĉiuj plaĉas al mi, esceptante la akvon. Ho la akvo! De kiam mi eksciis, ke mia patro mortis drone, mi sentas grandan teruron je akvo, kiun mi abomenas: mi eĉ ne povas ĝin vidi, sinjoro!

S-ro Paserkapo

Sekve vi ne lavas vin ĉiutage!

S-ro Timoplana

Ho jes, sinjoro, mi estas la pureco mem: vi volas do, ekscii, kiamaniere, mi min lavas? Bone, aŭskultu: mian kapon mi lavas per ia delikata bonodorilo, la dentojn—per ia bonega eliksiro, la buŝon—per ĉampano, la gorgon—per maljuna Jerez'o *; la laringon—per brando; la pulmojn—per konjako; la stomakon.....

S-ro Paserkapo

Sufiĉe, sufiĉe: kaj la manojn?

S-ro Timoplana

Ĉar mi ĉiam portas gantojn, mi nur bezonas purigi la gantojn per benzino.

S-ro Paserkapo

Kaj pri fruktoj? Ĉu vi amas melonon?

* Nomo de tre bongusta hispana vino.

S-ro Timoplana

Ne, sinjoro, mi ŝatas nur tutajojn: mi abomenas onojn, des pli se ili estas de melo.

S-ro Paserkapo

Kaj vinberojn?

S-ro Timoplana

Mi ĵus diris, ke mi ne amas erojn. Nur escepte, mi ŝategas monerojn, prefere orajn, ol argentajn kaj kuprajn.

S-ro Paserkapo

Kaj juglandojn?

S-ro Timoplana

Je Dio, sinjoro! Mi plej amas sendependecon: ĉiuj landoj devas esti liberaj, kaj ne submetitaj al ia ajn jugo.

S-ro Paserkapo

Kaj vi ŝatas kaŝtanon?

S-ro Timoplana

Vi sendube forgesas mian profesion: mi amas laŭleĝecon en ĉio: kiu volas tani, tiu tanu senkaŝe. Kial kaŝtano? Eble por ne pagi la regnan industrian imposton?

S-ro Paserkapo

Kaj pomojn?

S-ro Timoplana

Pomojn? Ne sinjoro, per unu pomo niaj unuaj gepatroj perdis la Paradizon; nur iam post iam mi trinkas cidron; ĉar mi neniam aŭdis, ke pomvino estas ia malpermesita trinkaĵo.

S-ro [Paserkapo

Ĉu vi ankaŭ malsatas pirojn?

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro, ili igas min rememori pri vampiroj, kaj mi sentas tuj teruran malplaĉon.

S-ro Paserkapo

Kaj daktilojn?

S-ro Timoplana

He, sinjoro, ne parolu al mi pri versoj latinaj nek grekaj; mi terure rememoras, kiam en la Universitato la profesoro min kapdolorigis per lernado pri daktiloj, amfibrakoj, kaj anapestoj. Pesto forprenu ĉiujn anapestojn! Kaj pri la amfibrakoj, mi ne respektas, ke ili estas amaj kaj havas—eble por sin defendi—fibrakojn!

S-ro Paseskapo

Mi esperas, ke vi amas oranĝojn?

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro, sufiĉas, ke ili havas en si oron kaj ion, vkazaŭ aranĝon.

S-ro Paserkapo

Bone, ĉar mi jam konas vian opinion pri la ĉefaj fruktoj, mi estus tre danka, se vi povus diri al mi, kia-
grade vi ŝatas la diversajn ĉambrojn de ia domo. Jen
demando tre interesa por la edzeca feliĉo: mi eĉ konas
geedzojn, kiuj petis pri eksedziĝo, nur pro tio, ke ili
havas malsamajn gustojn pri la ĝusta ornamo kaj for-
mo de la hejmaj ĉambroj.

S-ro Timoplana

La ĉambro, kiun mi plej ŝatas estas la mangoĉambro-
bro, poste la dormoĉambro.

S-ro Paserkapo

Kiamaniere vi plej ŝatas alkovojn?

S-ro Timoplana

Sinjoro, mi humile konfesas, ke mi ne sciis, ke al-
koj povas demeti ovojn: se tio estas obla, mi sendube
amos la alkovojn-frititajn.

S-ro Paserkapo

Kompreneble, pri salonoj, estas nebezone paroli,
ĉar ili estas onoj de salo.

S-ro Timoplana

Ĝuste, sinjoro.

S-ro Paserkapo

Kaj pri balkonoj?

S-ro Timoplana

Pri tio mi estas energia malakceptanto. La balo estas la ĉefa kaŭzo de nia societa nemoraligo kaj la konojn, kiujn oni akiras en balo, estas ja malvirtaj kaj pereigaj por la honesteco. Ĉu vi trovas prave, ke dum balo la viroj ĉirkaŭpremas plej senhonte la belajn virinojn? Ja hispana pastro diris jam plej prave:

Ho junuloj balamantaj
Vi nur iras al infero, kundancantaj!

S-ro Paserkapo

Bela sentenco! Sed se vi malamas balkonojn, almenaŭ vi devos toleri la fenestrojn?

S-ro Timoplana

Ne, sinjoro, vi eraras. En mia domo mi estas la sola estro, mi ne permesas loĝadon de aliaj estroj.

S-ro Paserkapo

Mi kredas, ke pro delikateco mi ne devas aludi kabineton.

S-ro Timoplana

Sinjoro, Kabineto estos ja la plej bela objekto de mia hejmo; ŝi faros mian feliĉon, kiel anĝelo....

S-ro Paserkapo (interrompante
lian revon)

Kaj pri teraso? Ĉu vi kredas, ke ĝi estas necesa por oportuna domo?

S-ro Timoplana

Mi ne amas kartludon: bonvolu nenion diri pri asoj, teraj aŭ ĉielaj.

S-ro Paserkapo

Kaj la ŝtuparo de la domo? Ĉu ĝi devas esti el marmoro?

S-ro Timoplana

El marmoro? Sinjoro, vi ja min mirigas! Vi, do, scias pri la moroj de la maro?

S-ro Paserkapo

Aŭkaŭ mi dezirus koni vian opinion pri la artoj kaj sciencoj. Ĉu vi estas amanto de muziko?

S-ro Timoplana

Jes, plej freneza amanto: ĝi estas mia pasio: mi konas parkere ĉiujn ĉefajn operojn, malnovajn kaj novajn: ĉu vi volas, ke mi kantu Faŭston? Plej volonte. (Li komencas kanti, sed tiel terure senagordece, ke S-ro Paserkapo rapidas surkovri per manoj siajn orelojn.)

S-ro Paserkapo

Sufiĉe, sinjoro, oni tuj vidas, ke vi havas tre belsonan voĉon (flanken: por disrompi eĉ la plej maldelikatajn aŭdojn.)

S-ro Timoplana

Dankon, sinjoro.

S-ro Paserkapo

Kaj kian muzikon vi preferas?

S-ro Timoplana

Mi preferas la muzikon malpezan, gajan. Mi abomenas la ariojn, speciale la akv' ariojn kaj koment'ariojn. Inter la muzikoj germana kaj itala, mi preferas la esperantan. Bonvolu, nur aŭdi:

Tra densa mallumo
Briletas la celo.....

(Li kantas per voĉo tiel malagrabra, ke S-ro Paserkapo preskaŭ svenas.)

S-ro Paserkapo

Ho haltu, haltu: ne laciĝu: mi ja rimarkas, ke tiu muziko, estas sendispute, la reĝino de la muzikoj.

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro, aŭdu nur tiun ĉi himnon.....

S-ro Paserkapo (flanken)

(Feliĉe, mi estas asekurita!)

S-ro Timoplana (kantante ankoraŭ pli malbele, ol antaŭe).

En la mondon venis nova sen... to...

S-ro Paserkapo

Haltu, haltu, ne penu. Mi jam havos oftajn okazojn aŭdi vian belan voĉon (flanken: je 20-kilometra

interspaco). Nun mi sentas, ke miaj koloj ekdoloras kaj eble baldaŭ pluvos. Ni daŭrigu la demandojn. Kiajn pentraĵojn vi plej ŝatas?

S-ro Timoplana

Ĉiajn, sinjoro: esceptante tiujn, kiuj kuŝas sur la vizagoj de virinoj: mi terure malamas virinojn sin pentrumantajn.

S-ro Paserkapo

Bone, bone. Kaj pri literaturo? Ĉu vi ŝatas Homeron?

S-ro Timoplana

Ne, sinjoro, mi ne amas erojn de homoj, sed homojn plenajn.

S-ro Paserkapo

Kaj pri Bajron'o?

S-ro Timoplana

Mi jam diris al vi, ke mi malamas onojn.

S-ro Paserkapo

(Kia malsaĝulo! Nur pro mia filino mi elportas ĉiujn liajn malspritaĵojn. Ho, kiom oni devas klopodi por edzigi filinon!) Kaj Ŝeskiro, la glora aŭtoro?

S-ro Timoplana

He, sinjoro, havu la bonecon ne prezenti al mi aŭtorojn en formo de piro!

S-ro Paserkapo

Kaj Racino?

S-ro Timoplana

Ne parolu al mi pri virinoj. La virinoj devas sin okupi pri mastrumado, nur pri tio. Estas ja ridinde, ke ili verkas, kiel viroj!

S-ro Paserkapo

Kaj pri teatraĵoj?

S-ro Timoplana

Mi plej ŝatas la unuaktajn, ĉar almenaŭ la enuigo nur daŭras unu horon kaj ne tutan nokton.

S-ro Paserkapo (flanken)

(Kia senhonteco! Eĉ li ne respektas, ke mi mem estas teatraŭtoro. Mi venĝos min al vi, kiam vi estos bofilo!) Ĉu vi ŝatas romanojn?

S-ro Timoplana

Jes, sinjoro. Kiu povas neŝati tiujn antikvajn kuraĝulojn? Cezaro estas unu el miaj favoritaj herooj.

S-ro Paserkapo

Sufiĉe pri artoj. Ni transiru al sciencoj. Ĉu vi ŝatas astronomion?

S-ro Timoplana

Dankon, sinjoro, sed dum nokto mi preferas kuŝi sur varma lito kaj ne trafrostiĝi pro malsaĝa scivo-

lemo. Por kio taŭgas scii, ĉu planedo faras plenan rondiron en unu tago aŭ en unu jaro? Ĝi rondiru tiel rapide, kiel ĝi volas. Por kio scii, ĉu suno havas makulojn? Tio nur pruvos, ke en la suna lando, eble oni ne konas la purigan econ de benzino. Por kio elserĉi la nomon de la steloj? Ili estu nomitaj kiel ajn. Por kio scii, ĉu iam estos suna mallumiĝo? Ĉu ni ne havas plej hele lumigajn lampojn elektrajn? Por kio plej ĝuste mezuradi la tempon? Nur por scii, ke hodiaŭ estas la 23^a de marto? kaj kio okazus se ĝi estus anstataŭe la 14^a de decembro? Ĉu ni ne manĝus same?... kaj konstati, ke ekzistas plej eminentaj, plej saĝaj—la diablo forprenu ilian saĝecon—plej naivaj viroj, kiuj okupadas sin dum plenaj tagoj pri kometo! Mi, kiu en skribado ne sole malŝatas la komojn, sed eĉ la oportunan haltigan punktaron!... Ni, lasu la astronomion, se vi ne volas interrompi mian digestadon.....

S-ro Paserkapo (kiu aŭdas kun miro tiun longan kolekton da malsaĝaĵoj.)

Ne flamiĝu, sinjoro, la afero ne meritas tion. Ĉu vi amas la botanikon?

S-ro Timoplana

El botaniko mi nur ŝatas la utilajn konojn. Ekzemple distingi la nevenenajn fungojn, scii, kiuj fruktoj kaj legomoj estas plej bongustaj, k. c.

S-ro Paserkapo

Kaj pri matematikoj?

S-ro Timoplana

Mi nur amas la elementan aritmetikon, ĉar ĝi estas necesega por niaj ĉiutagaj kalkuloj, sed ĉiuj ceteraj

matematikaj konoj estas nur malsaĝaĵo, kredu al mi, sinjoro, nur malsaĝaĵo. Por kio utilas scii, ĉu ia ekvacio havas aŭ ne realajn radikojn? Se ĝi ne havas realajn radikojn, des pli malbone por ĝi! Ĉu ni devas malĝojadi pro tio? Por kio scii, ĉu elipso ne havas asimptotojn? Tio nur montros, ke ĉe kurblioj avareco regas ja, kiel ĉe ni. Alie, ĉu hiperbolo povus havi du asimptotojn, vidante, ke ĝia fratino, la elipso, havas ja nenan? Ili havus ĉiu-po unu, kaj la afero estus facile aranĝita. Per kio povas nin interesi, ke du rektaj linioj perpendikularaj al sama tria rektlinio, estas paralelaj? Bone, se ili ne renkontiĝos, ili ne bezonos salti unu la alian. Por kio, do, scii, ĉu iaj surfacoj ne estas rektenaskitaj? Sendube ilia akusistino estus kulpa pri tio. Kial ni devas rompi al ni la kapon pri tio, ĉu serio estas aŭ ne konverĝa? Ĉu sciante tion ni evitos la pagon de la domlua kalkulo? Kaj mi intence ne parolis pri la superaj matematikoj, tio estas, pri kalkulo integrala kaj diferenciala, k. c., ĉar tio estas ja frenezaĵo! Okupi sin pri funkcioj transcendentaj? Bone, se ili havas aŭ ne dentojn, tio estas por mi tute bagatela. Kiel prave unu el miaj amikoj, parolante pri la infinitimeca kalkulo, diris plej sprite, ke ĝi estas nur lingvaĵo, kiun elpensis la frenezaj matematikistoj por reciproke interkompreniĝi!

S-ro Paserkapo

Sajnas al mi sinjoro, ke vi ne estas fervora amanto de matematikoj. Bone, kaj pri la filozofio, kion vi opinias?

S-ro Timoplana

Jen alia tute senutila scienco. Gravaj birdoj estas ja la filozofoj! Kaj kia interkonsenteco ĉe iliaj sciencaj kaj saĝegaj opinioj. Unu venas kaj diras: «animo ekzis-

tas kaj estas senmorta». Alia aldiras: «ĝi ekzistas sed ne estas senmorta». Tria por klarigi la aferon aldonas: «ĝi tute ne ekzistas». Bedaŭrinde, ke li lasis nin en la dubo, ĉu neekzistanta animo povas esti aŭ ne senmortal....; kaj kia logikeco ĉe la filozofoj! Venas la skeptikuloj kaj plejkompetentece certigas: «ke ili kredas al nenio» kaj tamen ili kredas al sia skeptikeco kaj ankaŭ al la bongusto de majstro preparita bifsteko! Mi donus al ili cent senintermankajn batojn, kaj ili konstatus, ĉu ili kredas aŭ ne al la efiko de mia bastono! (Li svingas ĝin minace.)

S-ro Paserkapo (timante)

He, sinjoro, ne forgesu, ke mi ne estas skeptikulo, nek filozofo.

S-ro Timoplana (ridante)

Ne timu, sinjoro, tio ne koncernas vin.

S-ro Paserkapo

Kaj pri la geografio kaj historio?

S-ro Timoplana

Sinjoro, mi trovas, ke la geografio estas tre utila scienco, sed ke ĝi bedaŭrinde tro uzas la proprajn nomojn. Ankaŭ io simila okazas pri la historio, kies utileco estas jam tre duba. Almenaŭ mi devas konfesi, ke en mia ĉiutaga vivo, mi neniel bezonis la sciigojn pri la almitoj de Aleksandro, nek pri la amo de Kleopatro. Ŝajnas al mi, ke la historiistoj estas tro scivolemaj babiluloj, ĉar ili povas elteni nenian sekreton, el tiuj, kiujn oni konfidis al ili. Laŭ tiu vidpunkto ili tre similas al ĉiudirantaj pordistinoj.....

S-ro Paserkapo (interrompante)

He, sinjoro, vi uzas esprimojn tre ofendajn.

S-ro Timoplana

Ĉu eble vi estas historiisto?

S-ro Paserkapo

Ne, sinjoro; tute ne. Kaj kiajn opiniojn religiajn vi defendas?

S-ro Timoplana

Mi estas ateisto, dank' al Dio.

S-ro Paserkapo

Kiel? vi ne estas kristano? Estas ja senutile daŭrigi: se vi ne havas kredojn religiajn, vi ne povas fariĝi mia bofilo: mia familio ĉiam distingigis per sia pieco, kaj mi mem estas tre fervora katoliko.

S-ro Timoplana

Bone, bone, se tio estas necesa, por mia edziĝo kun via ĉarma Kabineto, mi pripensos la aferon, kaj eble....

S-ro Paserkapo

Jes, sinjoro, plej necesa, ĉar penti poste estus tre malagrabla.

S-ro Timoplana

Ĉarpenti? Sinjoro, havu la boncecon klarigi tiun vorton ĉar mi ne povas toleri, ke vi min nomu ĉarpentisto.

S-ro Paserkapo (flanken)

(Tiu viro devas esti freneza kaj plej senutile estos daŭrigi tiun ĉi interparolon. Edziniĝi mia filino kun tia malsaĝulo estus ja igi ŝin malfeliceĝa. Mi, do, penas forpromenigi lin per plej nekredeblaj postuloj.) Mi petas vian pardonon sinjoro, mi ne celis vin nomi ĉarpentisto, mi nur diris, ke estus por vi tre malagrabla, se vi pentus pri edziĝo kun mia filino.

S-ro Timoplana

Dankon, sinjoro, viaj vortoj min trankviligas.

S-ro Paserkapo

Kial mi povus ofendi tian eminentan viron....

S-ro Timoplana (ekklinante sian kapon.)

Sinjoro.....

S-ro Paserkapo

.....Kiel vi estas; tiel kleran....

S-ro Timoplana

Vi min konfuzas....

S-ro Paserkapo

... Kaj spritan advokaton, kiel vi estas.

S-ro Timoplana

Ne laŭdu plu, sinjoro, mi ne meritas tian honoron.

S-ro Paserkapo

Sinjoro, mi multe bedaŭras tion diri al vi, sed mi ne povas konsenti, ke vi edziĝu kun mia filino.....

S-ro Timoplana

Kial?

S-ro Paserkapo

Ĉar, laŭ viaj respondoj, mi klare komprenis, ke via karaktero kaj ŝatoj, estas kontraŭaj al tiuj de mia filino.....

S-ro Timoplana

Ĉu tio estas ebla?

S-ro Paserkapo

Kaj edziniĝo kun vi, estus por mia filino plej granda malfeliĉo.

S-ro Timoplana

Kiel, sinjoro? Havu la bonecon klarigi pli detale. Kiel mi povus forlasi la feliĉon edziĝi kun via bela Kabineto?

S-ro Paserkapo

Jes, sinjoro, vi, ekzemple malamas akvon kaj kontraŭe, mia filino plej obstine ĝin ŝatas: ŝi banas sin ĉiutage kaj.....

S-ro Timoplana

Se nur estas tio, sinjoro, mi konsentos kaj por ŝin plezurigi, mi akceptos akvon por ĉio.

S-ro Paserkapo

Ankaŭ mia filino ŝatas tiujn fruktojn kaj mangojn, kiujn vi ĝuste abomenas kaj tio estas grava malhelpo.

S-ro Timoplana

Ne malpacu ni pro tio, mi penas kutimiĝi al ĉiuj de ŝi preferataj mangoj, kaj tiamaniere ni povos esti feliĉaj geedzoj.

S-ro Paserkapo

Vi ankaŭ diris, ke tre malplaĉas al vi fenestroj kaj balkonoj, dum mia filino, kontraŭe, tre ŝatas esti en ili, rigardante la stratajn preterirantojn.

S-ro Timoplana

Bone ŝi havos tiom da balkonoj, kiom ŝi volos: ni ne disputu pri tia bagatelo.

S-ro Paserkapo

Fraŭlino Kabineto abomenas muzikon kaj fariĝas malsana nur aŭdante ian kanton kaj vi estas furioza amanto.....

S-ro Timoplana (interrompante)

Mi promesas, ke ŝi min aŭdos neniam kantantan. Tre bedaŭrinda ofero estas por mi ne montri la ĉarmojn de mia bela voĉo, sed por ŝi mi estas kapabla tion fari (ellasante ekĝemon.)

S-ro Paserkapo

Mia filino tre ŝatas la dramojn kaj tragediojn kaj pri tio ŝi estas obstina kapriculino.....

S-ro Timoplana

Ŝi iros kun mi ĉiunokte al la teatro. Tio ne malhelpas.

S-ro Paserkapo

Fraŭlino Kabineto tre multe lernadis matematikojn kaj astronomion. Ŝi plej ofte pasigas la noktojn esplorante la ĉielon.

S-ro Timoplana

Tion ne malhelpos al mia dormado: mi restos sola en lito ĉiujn noktojn, kiam ŝi deziros observadi. Tre malagrabla estas tia soleco por amanta edzo, sed en la celo, ke ŝi estu kontenta, mi tion akceptos.

S-ro Paserkapo

Same mi diras pri filozofio. Ŝi multe amas la filozofiajn verkojn, kaj pasigas multajn horojn ilin legante.

S-ro Timoplana

Se nur mankas tio, mi promesas al vi, ke mi aĉetos por ŝi la plej belan filozofian libraron, kiun oni povos trovi.

S-ro Paserkapo (flanken)

(Ne estas rimedo por forsendi tiun ĉi burdon. Kion mi diros al li por ke li forlasu sian edziĝan obstinecon). (Laŭte) kaj kiel mi diris al vi, antaŭ ol edziĝo vi devos akcepti grandvaloran asekuron.

S-ro Timoplana (iom ŝanceliĝas kaj pensas, sed fine li diras.)

Bone, sinjoro, malgraŭ, ke mi pruvis al vi senutilecon de mia asekuro, mi, tamen, asekuriĝos, se tio estas nepra kondiĉo.

S-ro Paserkapo (flanken)

(La diablo vin kaptu, tedegulo. Kion mi elpensos por lin fortimigi.) (Laŭte.)

Kaj plie, mia filino estas plej entuziasma kolektantino de poŝtkartoj kaj markoj, kaj tio postulas tre grandan monelspezon.

S-ro Timoplana

Tre bele! Ĝuste mi estas kolektanto, kaj posedas tre belan kolekton, kiun mi al ŝi transdonos. Eĉ mi povas diri al vi, ke mi tre amas kolektojn, speciale, se ili estas el banknotoj. Nur unu kolektadon mi malamas, tiun de la jaroj: mi multe bedaŭras, ke kontraŭvole mi ĉiujare kolektas unu jaron pli por mia aĝo.

S-ro Paserkapo (flanken)

(La peston por la malspritulo!) (Laŭte.) Ankaŭ mia filino ne povas toleri virojn drinkemajn, nek kartludemajn, nek odoron de tabako.

S-ro Timoplana

Ŝi estas tre prava: mi ne drinkos, nek kartludos, nek fumos.

S-ro Paserkapo

Ŝi ankaŭ malamus avaran edzon.

S-ro Timoplana

Vi parolis pri avaro? Nu, mi ne havos avojn, nek avinojn, eĉ mi ne konis ilin.

S-ro Paserkapo (flanken)

(Mi eksentas deziron lin sufoki.) (Laŭte.) Nek avidan.

S-ro Timoplana

He, sinjoro, mi estas avida, jes, sed tio estas neevitebla. Kiu ne estas ido de siaj avoj?

S-ro Paserkapo (flanken)

(Mi furiozas! Helpu al mi Dio kontraŭ tiu ĉi frenezulo!) (Laŭte.) Kaj ankaŭ ekzistas tre grava baro por via edziĝo. Mia konscienco devigas min esti sincera pri tio. Mia filino estas malsana: ŝi suferas je komenca ftizo.

S-ro Timoplana

Bone, bone. Mi flegados ŝin plej ame, kaj mi ne dubas, ke miaj zorgoj kaj la helpo de via kuracista talento sukcesos ŝin baldaŭ resanigi.

S-ro Paserkapo (flanken)

(Kaj li eĉ kuraĝas moki pri mia profesio! Ho mia Dio, eltiru min el tiu ĉi turmentego! ... Ho, jen la sava ideo! Brave, brave! Mi diros al li, ke mia filino devas edziniĝi sen doto kaj tiu sciigo sendube igos lin forlasi sian projekton) (Laŭte.) Kaj, fine, mia sinjoro, mi devas sciigi vin pri lasta kondiĉo, kiun sendube vi

ne akceptos. Pro kaŭzoj, kiujn mi ne povas al vi klarigi, mia filino, estos sendota, kiam ŝi edziniĝos.

S-ro Timoplana (Kun miro)

Sendota?

S-ro Paserkapo (Kun neesprimebla ĝojo.)

(Flanken) (Ho la bela artifaĵo! mi sukcesis!) (Laŭte.) Jes, sinjoro, sendota.

S-ro Timoplana

Sed kien ŝi estas sendota?

S-ro Paserkapo

Sinjoro, mi ne komprenas.

S-ro Timoplana

Se vi ne prenas komon, tio nur estas via afero, sed mi denove demandas: kien ŝin oni sendos?

S-ro Paserkapo (flanken)

(Sendube li estas tute freneza: mi preskaŭ komencas lin kompati.) (Laŭte). Nenien oni sendos ŝin. Sendube vi ne bone komprenis mian personon. Mi volis diri, ke ŝi estos sendota. Ĉu vi scias, kio estas «sen doto»?

S-ro Timoplana (kolere)

Jes, sinjoro, mi scias, kio estas «send'ot'o.» *Send'ot'o!* Mi ne bezonas viajn instruojn por kompreni mian lingvon.

S-ro Paserkapo (eltenante kun peno)

Nu, sinjoro! Mi ne scias pli bone min esprimi. Ŝi estas sen-dota. (Elparolante tre malrapide la silabojn.)

S-ro Timoplana

Ankoraŭ vi ripetas «send'ot'a» (Imitante lian elparolan manieron). Al la diablo via send'ec'o!

S-ro Paserkapo (furioze)

Sen'dec'o! Mi sendeca! Vi, ja nur vi, estas la sendeculo! Fripono! kanajlo!

(Ambaŭ leviĝas kaj sin ĵetas unu kontraŭ la alia. S-ro Paserkapo sukcesas elpreni el la manoj de S-ro Timoplana lian bastonon, kaj komencas lin batadi plej sonkompate sur la dorson, la kapon kaj kien ajn. Pro la bruado, kiun ili faras, alvenas du servantoj kaj sukcesas post multa penado ilin disapartigi).

S-ro Timoplana (tondre kaj minace).

Kanajlo! Asekura ŝtelisto! Mortigisto kuraca kaj dramal.... Mi prezentos kontraŭ vi plendon al la tribunalo pro insultado kaj kontuzo.

S-ro Paserkapo

Mi kisas viajn manojn. (Imitante la elparolan manieron de S-ro Timoplana.) Plendo pro kontuzo!! Vi parolas malĝuste, sinjoro! Mi uzas la kontojn por miaj honestaj klientoj; por la friponoj, mi uzas la bastonon!

(S-ro Timoplana elĵetas minacegan rigardon al S-ro Paserkapo, kvazaŭ li volus per ĝi lin neniigi, kaj rapide eliras faletante du aŭ tri fojojn).

LA KURTENO FALAS

LA PENTRISTO

(SENSPRITA HUMORAĴO)

En Pentrejo, urbo kuŝanta sur Kolorlando, apud Paŝtelrivero kaj proksime de montaro Akvarelo, vivis antaŭ tre longe ia juna pentristo, kies pentrarto estis tiam sendispute laŭdegata de ĉiuj pentrintoj, pentrantoj kaj pentramantoj de la mondo.

Lia pentra famo estis vere meritita: la pentrado havis por li nenian sekreton, ĉar en ĉiuj pentrofakoj li mirinde sukcesis. Estis loga plezuro vidi lin ĉiumatene pentrantan en lia pentroĉambro antaŭ pentrotolaĵo, kun pentrokolora tabuleto en unu mano kaj pentrilo en la alia!

Ĉiuj pentraj nuancoj plej bele elmontrigis en liaj pentraĵoj: eĉ la plej malfacila pentreblaĵo, vera malespero por fipentristoj estis por li nur infana pentroludaĵo!

Oni plej ofte raportadis diversajn mirakazojn pri lia majstra kaj ĉiekonita pentrolerteco.

Unu fojon nia pentristo plej fidelkopie elpentris ian scenon de ĉasado: meze de la pentraĵo aperis flugrapide kuranta leporo, persekutata de tri ĉasistoj. Oni kondukis ĉashundon kaj prezentis al ĝi la pentraĵon kaj la besto trovis tiel reale pentrita la leporon, ke tuj post ĝia ekvido, ĝi bojis, furioze sin jetis al ĝi..... kaj kompreneble mordediŝiris la pentrotolaĵon kaj renversis ĉiujn apudstarantajn objektojn: pentrotenuilon, pentrilujon, pentropotojn k. t. p.

Alian fojon nia pentristo pentris belegan kaj pentrindan marvidajon: oni vidis en ĝi tiel bone prezentita la ondmovadon kaj la balanciĝon de veturanta ŝipo, ke—ne estas trograndigo—eĉ ŝipestro vidis tiun marpentritajon kaj tuj eksentis signojn de marmalsano!

Unu el la plej belaj produktaĵoj de tiu fama pentristo estis vidaĵo el dezerto: en ĝi aperis ia stranga karavano haltinta por tagmanĝi; la suno dissendis siajn fajrajn radiojn sur la brulantan sablon. Kaj stranga afero! estis tia realeco en la pentraĵo, oni tiel bone sentis la efikon de varmeco, ke—eble vi ne kredos tian mirindaĵon!—alproksimigante al la pentraĵo termometron oni tuj konstatis, ke ĝi signas 70° centigradojn super nulo!

Ankaŭ nia pentristo faris tre belajn portretojn, sed li ne ŝatis tian pentrofakon, ĉar ĝi postulis de li tre multajn zorgojn. Pentrinte la unuan portreton (de ia juna princo) li povis rimarki, ke la prezentita princo movadis la okulojn, kvazaŭ vivulo, malfermis la buŝon, kiam la tagmanĝa horo alproksimiĝis, kaj post kelkaj tagoj bezonis esti razita, ĉar lia barbo kreskadis en la portreto supermezure.

Pri naturaj pentraĵoj ankaŭ nia pentristo agadis delikate: li kutime pentradis trankvilajn scenojn, kvietajn realaĵojn. Unu fojon, li pentris vidaĵon de kamparo dum ventego kaj pluvo kaj bedaŭrinde la saman nokton li devis disŝiri la pentraĵon, ĉar el ĝi aŭdiĝis tiel forte la bruegado de la vento, la pluva frapado kaj la tondraj eksplodoj, ke tute neeble estis dormi je kelkaj paŝoj de la pentraĵo.

Estus senfina afero rakonti ĉiujn similajn pentromiraĵojn. Sufiĉos se mi diros por lia plej alta laŭdo, ke tiam nia pentristo lertigis en prenrarto multajn samurbajn virinojn kaj tiel multe ili de li ellernis, ke ne kontentigitaj per surpentrado de tolaĵoj kaj tabuloj, ili elpensis fari la samon sur sia vizaĝo kaj de tiu tempo

la virinoj—precipe la malbelaj—en plibeliga celo pentrumas al si per ĉiuspecaj pentrumiloj la vangojn, li-pojn, orelojn k. c.

Nia pentristo fariĝis milionulo per la vendado de siaj pentrokreaĵoj kaj tiel rapide multenombriĝis la mendoj, kiujn li ricevis el ĉiuj urboj de la mondo, ke venis ia tago, kiam li jam ne trovis sufiĉan tempon por fari ĉiujn menditajn pentraĵojn kaj li devis tion anonci kaj ĉesigi la pentron por publika vendo.

Grandan bedaŭron kaŭzis tia sciigo; malgraŭ la petoj de la aĉetantoj de pentraĵoj kaj la propono de pli alta aĉetprezo, nia pentristo obstine rifuzis ĉiujn mendojn kaj dediĉis sin al ripozo, kaj al plezuroj de trankvila vivado kun sia edzino kaj multenombraj geinfanoj, ĉar malgraŭ, ke mi tion ankoraŭ ne diris li estis edziĝinta kun belega virino, tiel fruktodona pri filetoj, kiel li mem povis esti pri pentraĵoj.

Kaj tiel pasis kelkaj feliĉaj jaroj dum kiuj nia pentristo nur pentris la portretojn de siaj infanoj, kaj faris nur kelkajn privatajn pentraĵojn por la ornamo de sia propra domo.

Iom post iom la publiko komencis forgesi la pentriston, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis ĉiam nomata kun admiro en ĉiuj artistaj salonoj. Kaj kredeble lia nomo estus fine tute nememorigita, se ia eksterordinara okazo, ne estus ĝin famiginta pli ankoraŭ ol liaj majstraj produktaĵoj.

Oni aranĝis tre gravan ekspozicion de pentraĵo en ia eŭropa ĉefurbo, kie nun estas tre granda movado esperantista. Leginte tiun novaĵon, nia pentristo eksentis deziregon partopreni kaj prezenti pentraĵon. Ĉar la malfermo de la Ekspozicio devis okazi post kelkaj tagoj, nia pentristo komencis tuj sian laboron kaj dediĉis al ĝi sian tutan talenton kaj diligentecon. La pentraĵo prezentis ian junan kaj belan ftizulinon, parolantan kun sia fianĉo. La palega vizaĝo de la junulino kaj

ŝia malgrasa korpo montris plej klare ke la terura mal-sano estis multe progresinta kaj ke la kompatinda virino baldaŭ diros adiaŭ al la mondo. Ŝia fianĉo avide ŝin rigardis kaj en lia vizaĝo estis esprimita tiu malespera ĉagreno, kiun oni sentas vidante amegatan estaĵon, kiun morto baldaŭ ekkaptos.

Kiam la pentraĵo estis finita, nia pentristo kaj lia familio vojaĝis en la urbon de la ekspozicio. Lia projekto estis tie pasigi kelkajn semajnojn kaj atente vidi ĉiujn prezentitajn pentraĵojn. Tio estus por li granda plezuro kaj li mem povus konstati la akcepton de la publiko difinitan al lia nova artproduktaĵo.

La ekspozicio havis plej brilantenditan sukceson. El ĉiuj lokoj de la mondo venis vizitantoj: oni prezentis multenombrajn amason da pentraĵoj kaj la salonoj kaj koridoroj de la ekspozicio estis tre malvastaj por enteni publikon tiel multenombrajn.

La ftizulino de nia pentristo altiris la rigardon de ĉiuj alestantoj: ĉiumomente staris antaŭ la pentraĵo amaso da vizitantoj ekstaze rigardante la belan pentrokreaĵon. Oni ankoraŭ ne sciis, kiu ricevos la unuan honoran premion, sed almenaŭ la publiko estis, jam unuanime difininta sian preferon al la ĉarma ftizulino.

Nia pentristo ricevis ĉiumomente la gratulojn de la entuziasmigaj vizitantoj. Kiel bele montriĝas por artisto la sinceraj aplaŭdoj de publiko! Ho gloro, kiom da netaĵoj artistoj mortis revante al vi! Kiom da oferitoj vi ĉiam englutis!

Tre belaj estis tiuj tagoj por la pentristo. Sed mal-feliĉe la ĝojo daŭras tre mallonge sur la tero. Kaj nia pentristo devis pasi el la plej pura ravo en la plej malesperan ĉagrenon!

Jen kiel okazis tiu neatendita kaj subita ŝanĝo.

Ian tagon estis nia pentristo apud sia pentraĵo rigardante grupon da vizitantoj, kiuj staris antaŭ «la

ftizulino» ekstaze ĝuante la belajojn de tiu senkompara ĉefartajo.

Kaj nia pentristo subite rimarkis, ke en la vizaĝo de la rigardantoj aperis tia sama paleco, kiun li estis pentrinta por sia ftizulino. Mirinda okazo!—«Ĉu ili ankaŭ suferas tiun danĝeran malsanon aŭ eble miaj okuloj perfide min trompas?» demandis sin alarme la pentristo.

Kaj li restis en sama loko komparante la mienon de sia ftizulino kun la vizaĝo de la rigardantoj. Kaj stranga koincidaĵo! Venis novaj kaj novaj vizitantoj por vidi la pentraĵon kaj ili ĉiuj elmontris la saman timigan palecon!

—Sendube mi songas—diris al si la pentristo kaj li revenis en sian hejmon kun videbla malbonhumoro.

La sekvantan tagon nia pentristo daŭrigis sian observadon kaj terura okazo! la vizaĝoj de ĉiuj vizitantoj estis ankoraŭ pli palaj kaj malsanmienaj, ol la antaŭan tagon.

Nia malfeliĉa pentristo foriris konsternita el la ekspozicio.

Kiel? Ĉu estis eble, ke ĉiujn vizitantojn kaptis la sama paleco? Ĉiuj samtempe malsanaj? Kiel klarigi al si tiun teruran fenomenon? Ĉu eble la pentraĵo per sia realeco estis transiginta la neresanigeblan malsanon al ĉiuj siaj atentaj rigardantoj? Neeble, neeble. Kiel povus efiki tiel aktive kaj rapide ia pentrita tolaĵo?

Kaj nia pentristo, kaptita de terura emocio, paŝadis maltrankvile en sia ĉambro, farante kaj referante al si la plej strangajn demandojn.

—Kial oni ŝategas la ĉarmojn de pentrarto? Por kio ĝi taŭgas?—ripetis al si centafoje la kompatindulo.—Oni pentras ian malsanulinon kaj jen ŝi malsanigas ĉiujn siajn admirantojn! Malbenita arto!

Kaj li tiel daŭrigis dum kelkaj horoj, ne povante sin eltiri el tiu malfeliĉa situacio. Fine venis al lia

kapo la ideo memmortigi kaj li estis preta sin pendigi, kiam lia edzino neatendite eniris en lian ĉambron kaj per sia alesto malhelpis al lia malespera decido.

—Kio estas al vi? demandis ŝi karese. Via vizaĝo estas torure pala kaj montras plej profundan agitecon. Ĉu vi estas malsana? ĉu ia malfeliĉo vin trafis.

La pentristo raportis al sia edzino ĉion, kion li estis rimarkinta, ne kaŝante eĉ la plej malgravan detalon.

Kiam li finis, ŝi ekridegis plej naive.

—Ne maltrankviliĝu, mia kara, ŝi aldonis kuraĝige, sendube io konfuzis vian vidon kaj tial viaj okuloj montris al vi tion, kio ne ekzistas. Viaj timoj estas nur absurdaj. Estu gaja kaj ne pensu pri tia malsaĝaĵo.

Sed tiuj vortoj ne forigis la malgajecon de la pentristo. Li obstinis kredi, ke ĉiuj alestantoj de la ekspozicio estas ftizaj kaj li estas la sola kulpulo de tia malfeliĉego.

—Ni baldaŭ ekscios la veron—daŭrigis ŝi serioze. Mi mem iros tuj en la ekspozicion kaj atente esploros ĉies vizaĝojn. KREDU, edzeto, miaj okuloj ne min trompos kaj mi baldaŭ revenos por sciigi vin, ke ĉiuj vizitantoj estas plej bonfartaj, kun rozkoloraj vangoj kaj plej gajaj mienoj. Viaj okuloj kutimintaj elpensi scenojn por viaj pentraĵoj ankaŭ figuris al si tian teruran palecon, kiu nur ekzistas en la ftizulino de via lasta kreaĵo.

Kaj ŝi foriris lasante sian edzon en la plej kruela necorteco.

Pasis unu horo, kiu estis kvazaŭ monatlonga por nia pentristo. Li atentis ĉiujn bruetojn de la domo, avidante la revenon de sia edzino.

Fine oni sonoris kaj post kelkaj momentoj ŝi venis al sia edzo.

La pentristo rigardis ŝian vizaĝon kaj terure rimarkis en ĝi la saman lin persekutantan palecon. Ŝi volis ekparoli, sed malĝojo korpemanta nur permesis al ŝi

plori. Ŝi falis en la brakojn de sia edzo kaj tie restis ploranta dum kelka tempo.

Ĉio, do, estis vera! La pentristo ne estis trompiginta: jen la mortiga rezultato de tiu lasta pentraĵo; el kiu li nur esperis aplaŭdojn kaj gloron!

Terura estis tiu nokto por la pentristo! Li pasigis ĝin en agita febrostato. Nur lia pensado celis lian lastan pentraĵon kaj la malfeliĉegon de ĝi kaŭzitan. Plej strangaj premsonĝoj sendese lin turmentis. Jen li vidis, ĉiujn vizitantojn de la ekspozicio, kiuj amase sin turnas al li furiozaj, nomante lin mortiginto, kaj minace postulante, ke li redonu al ili la perditan sanon! Jen li vidis la malrapidan iradon de proceso, en kiu li estis la sola kulpigito pri la morto de miloj da personoj. Kaj la kuracistoj—stranga maloftaĵo—unuanime konsentis pri sia informo. Ili certigis, ke lia pentraĵo estis la kaŭzo de ĉio, kaj ke la ftizo estas el la pentraĵo transiĝinta en ĉiujn vizitantojn de la ekspozicio. Vane lia defenda advokato penadis lin senkulpigi: ĉiuj staris kontraŭ la pentristo, kiu fine estis mortkondamnita. Kaj li vidis sin irantan al la eŝafodo kaj tie pastron lin konfesprenontan kaj ekzekutiston pretan plenumi siajn terurigajn funkciojn. Post tio la sceno tute ŝanĝiĝis: li trovis sin en bruega loko: tie oni kriadis surdige, oni kantadis plej malsanktaju kantojn: de tempo al tempo oni aŭdis blasfemojn kaj malĉastajn jurojn. Kaj en tiu loko, oni sentis sufokan varmecon. La pentristo penis iom kompreni, sed ne povis. Tia bruegado ne permesis ion klare distingi: li restis kelkajn momentojn en freneza kaptiĝo: sed iom post iom ĉesis la voĉoj, la kantoj, la blasfemoj kaj ĉiuj bruoj: li rigardis fikse, kaj, vidis tre malproksime, ian grandegan amason da brulanta lignaĵo. Ĉirkaŭ ĝi rondiris dancante, mano en mano, multenonbra amaso da viroj kaj virinoj. Ili ĉiuj estis nudaj, malgrasegaj kaj terure palaj. Ilia malbonfarta mieno kaj malfortika korpo plej videble kontras-

tis kun la furioza danmovado, tiel rapida kaj freneza, ke ĝi vere kaŭzis kapturnigon. La flamoj sin levis alten kaj sur ilia pinto kuŝis io malrapide balanciĝanta. Kio povis esti tia objekto? La pentristo rigardis ĝin atente kaj baldaŭ terurtremo trakuris lian korpon. La pendanta objekto estis ja la sama pentraĵo, kiun li estis prezentinta en la ekspozicio. Kaj la rondkurantoj bruege kriadis, laŭdante lian nomon!

Multaj timigaj scenoj prezentigis al la malfeliĉa pentristo dum tiu longa kaj neforgesebla nokto. Fine, lia korpo lacigita pro sufera eksciteco, ne povis plu elteni kaj li restis profunde, senmove dormanta dum kelkaj horoj.

Estis jam tagmeze kiam li elvekiĝis. Li konfuze rememoris ĉion songitan dum la antaŭa nokto kaj sentis sin plej malgaja. Vane lia familio penadis distri lin kaj forjeti lian teruran pensobstinon. Li pasigis kelkajn senintermankajn horojn ne volante paroli, nek mangi: sola li restis en sia ĉambro pensante nur pri sia malfeliĉo. Sendube la Muzo de la pentristoj (se ili ĝin havas) kompatis nian malfeliĉulon kaj lin eltiris el lia freneziga ĉagreno. Kaj mi tion certigas, ĉar nia pentristo subite leviĝis, komencis kanti laŭte kaj gaje kaj petis, ke oni tuj alportu al li, pentrotolajon, pentrilojn, k. c.

Kio povus esti kaŭzinta tian neatenditan ŝanĝon?

Nia pentristo preparis la pentrotolajon kaj dediĉis sin al la pentrado de nova kreaĵo. Li tion faris tiel atente, entuziasme kaj inspirite, ke la sekvantan tagon lia pentraĵo estis jam tute finita. Ne perdante tempon, profitante la cirkonstancon, ke la ekspozicio estis fermita ĉiujn noktojn, li subaĉetis ian pordiston, kiu permesis al li eniri en la salonon, kaj li rapidis forpreni la pentraĵon pri la fizulino metante anstataŭe en ĝian lokon la pentraĵon de li ĵus faritan.

La sekvantan tagon io eksterordinara okazis en la

ekspozicio: ĉiuj vizitantoj, kiuj kutimis halti antaŭ la mirinda ftizulino por ĝin admiri, plej surprize konstatis ke ŝi estis malaperinta kaj anstataŭ la belega pentraĵo tiel fame konita ili trovis novan tute malsaman pentraĵon.

Tiu ĉi prezentis grupon da belaj kaj fortikaj gejunuloj sin dediĉantaj en ĝardeno de lernejo al gimnastikaj ekzercoj. En la mezo de la ĝardeno staris la profesoro direktante tiun gajan lernantaron kaj kun videbla mieno de fiera memkontentigo. Senorde dismetitaj la disciploj aperis en grupoj, unuj suprenlevante halterojn, aliaj rapide sin movantaj sur paralelaj bariloj, aŭ ekzercantaj sin en trapezo, aŭ transsaltante aŭ kunboksante. Eĉ enestis belaj virinoj plej fervore okupataj en utilaj ekzercoj por plidikigi siajn tibikarnojn, elkurbigi la bruston, malaperigi la troan ŝvelkreskadon de ventro k. c. En ĉiuj vizaĝoj sin montris tia animita signo, kiu plej klare esprimas bonfartecon. Multaj junuloj estis ŝvitantaj, ĉiuj rugkoloraj pro penado kaj iliaj nudaj brakoj kaj kruroj montris muskolojn plej ŝvele kreskintaj.

Grandan impreson faris sur la publikon tiu nova pentraĵo. Ĝi estis tiel arte kaj reale pentrita, ke la vizitantoj tute ne bedaŭris la anstataŭon de la malfeliĉa ftizulino. Denove la pentristo ricevis senĉese plej varmajn gratulojn por sia nova kreaĵo, kaj komencis ĝui tagojn de plezuro kaj ripozo.

Ian matenon li estis apud la nova pentraĵo rigardante grupon da vizitantoj, kiuj staris ĝin admirante, kaj li povis plel ĝoje rimarki, ke ĉiuj elmontris bonfortan mienon, eble ankoraŭ pli fortikan, ol tiu de la gimnastikantoj. Venis nova grupo kaj la observo estis samrezultata. Pasis kelkaj horoj kaj nia pentristo ĉiam konstatis la privilegion sanon de ĉiuj, kiuj rigardis lian pentraĵon. Eĉ kelkaj sentis grandajn dezirojn gimnas-

kiki kaj fermante la pugnon serĉe minacis al siaj apudaj kunrigardantoj.

—Dank' al Dio! ekkriis ĝojege nia pentristo. Ĉiuj estas jam savitaj el la terura malsano. Mi povas nun trankvile vivi.

Kaj li rapidis al sia hejmo por ĉion sciigi al sia edzino. Oni ja povas kompreni la feliĉon de nia heroo, kaj la scenon, kiu okazis inter la geedzoj. Sed, kion eble miaj karaj legantoj ne povas tiel facile kompreni, tio estas, ke nia pentristo montris deziron tuj reiri en sian loĝurbon. Vane estis la petoj de lia familio, ke li atendu nur kelkajn tagojn por sciigi pri la rezultato de la ekspozicio kaj la aljuĝo de premioj. Li obstine rifuzis kaj lia familio forvojaĝis kun li tiun saman tagon.

De tiam nia pentristo neniam pentris ion nek sin okupis plu pri la pentrarto. Li plej bone rememoris ĉion, kion kaŭzis lia pentrita ftizulino kaj plej terure malamis la pentraĵojn. Se iu el liaj amikoj ekparolis pri pretrarto, li tuj devigis lin silenti kaj pritrakti alian temon.

Kaj mi estas certa, ke en la okazo, se nia pentristo vivus ankoraŭ kaj konus Esperanton, li plej multe penadus por forpreni la radikon *pentr'* el la Universala Vortaro, kompreneble se nur Ĝia Lingvo—Komitata Moŝto permesus al li tion!...



MIA NAJBARO



Al Sinjoro Codorniu,
Tre fama inĝeniero,
Ankoraŭ pli eminenta,
Ol Sinjoro Kerubeno.

En la mondon venis... ne *nova sento* (kio jam estas iom malnova inter la nenovaj Esperantistoj) sed la plej mirinda, ŝaĝega kaj stranga viro, kiun oni povis iam vidi, eble pli stranga ankoraŭ, ol tiu, kiun oni prezentas al ni en «Teksto sinteza»

Ĝi estas mia najbaro Sinjoro Kerubeno Biskvitama kaj Dolĉekisa, tre fama kuracisto, kiu ne kutimas mortigi la sanulojn, kiel iaĵ liaj samprofesianoj, sed kontraŭe, kiu resanigas ĉiujn de li kuracatajn malsanulojn. Ĉiuj liaj klientoj ĝuadas plej bonan farton kaj oni povas ja antaŭvidi, ke lia klientaro ĝuste pro tio estas pli multenombra, ol la esperantista stelaro. (Mi ne diras «la ĉiela stelaro» ĉar tiu komparo estas jam malnova kaj vulgara.) Nur unufoje okazis, ke ia sana kliento de mia najbaro mortis, sed li mortis je subita morto, ĝuste, ĉar oni ne avertis antaŭe nian kuraciston.

Kiam Sinjoro Kerubeno eksciis pri tiu malfeliĉo, li preskaŭ frenezigiĝis pro ekscito. Li nomis la Morton, perfidulo, rabisto, kiu profitas la maleston de kuracisto kaj aliaj tiaspecaj «ĝentilaĵoj», kaj, ho mirinda efiko! la morto de tiam respektis mian najbaron kaj ĉiujn liajn kuracotojn

Pri medicino li estas tiel lertega, ke ni devas danki

Dion pro tio, ke ne venis ankoraŭ en lian kapon la ideo revivigi mortintojn, ĉar se li estus nur ekpensinta pri tio, ni vidus sur la strato promenantajn ĉiujn niajn praulojn, ne forgesante la glorajn mortintajn nemortulojn, inter ili eĉ Cezaron (malgraŭ, ke li estis mortigita de ia bruta Bruto, laŭ plej konsente raportas al ni ĉiuj skribitaj kaj skribotaj historioj)

Kaj ne kredu, ke Sinjoro Biskvitama kaj Dolĉekisa estas nur kompetenta pri kuracado. Li profunde konas ĉiujn sciencojn kaj havas memorkapablon pli fidelan, ol tiun de la neforgesebla ĉionscianta pastro Moigno.

En Matematikoj li estas vera mirindaĵo. Li parkere scias la tabelojn logaritmajn: por li Callet'o ne estis kaleto sed io ankoraŭ pli eta kaj sensignifa.

Oni kredas ĝenerale, ke la Eŭklida postulato estas nepruvebla (inter parentezo: mi ne komprenas kial oni nomas *post'ul'ato* aferon tiel antaŭan al nia tempo): sed tio estas nur malsaĝa opinio de la matematikistoj: S-ro Biskvitama trovis rektan pruvon por la fama postulato kaj pri tio li prezentos raporton al la scienca akademiano, tuj kiam li finos medicinan raporton, kiun li nun verkadas sub la deloga titolo: «Influo de la kula flagbruado sur la kormalsanojn kaj la cerbatakojn, kiel rezultato de digesto interrompita pro surpermezura nenormala trograndiĝo de la maldekstra orelo kaj atrofia stato de la organoj kuŝantaj en la antaŭ-dekstra-malsupra parto de la intesta regiono.»

Demandu Sinjoron Kerubenon pri ia ajn farota kalkulo; li tuj diros al vi ĝian rezulton. Ekzemple: demandu: «kiu nombro estas la kubo de 520?». Kaj li tuj aplombe respondos:—207.415 Estas vere, ke la ĝusta kubo estas 140 608.000 (se mi ne eraris kalkulfarante, ĉar mi ne estas tiel lerta, kiel mia najbaro) kaj ne 207.415, kaj ke ambaŭ nombroj *iom* inter si diferencas, sed tiu bagatelo ne ŝanceligas nian heroon, nek haltigas lian tujan mirandan devinemon.

Kaj se tio okazas pri potencoj, volu nun konsideri. kio fariĝos pri radikoj. Nenia radikoj lin timigas, eĉ se ĝi estas tiel ribelema, kiel cikado aŭ cigado aŭ cikato k. c., kiu pli ofte ŝanĝiĝas, ol hispana nuntempa ministraro.

Pri botaniko li estas ankoraŭ pli lerta: sufiĉas, se mi nur diras al vi, ke li aŭdas la kreskadon de la herbo

Kaj pri lingvoscienco? Li flue parolas (kompreneble kun si mem) 3 mortintajn lingvojn, 117 vivajn, kaj 699 dialektojn (mi ne kalkulas en ilin la katalanan, ĉar ankoraŭ ekzistas dubo, ĉu ĝi estas lingvo aŭ dialekto, kaj klasigi ĝin en unu aŭ alian vicon, estas ofendi multenombrojn aron da viroj loĝantaj en Hispanujo.)

Ĉar Sinjoro Kerubeno estas plej fervora katoliko, li iam amuzis sin tradukante Biblion, en ĉiujn de li konatajn lingvojn. Li sin turnis al ia grava libristo el Londono por la publikigo de sia verko, sed la eldonisto rifuzis, ĉar ĝi konsistus el 789 volumoj, bezonus por presado 50 jarojn kaj ĉiu ekzemplero estus vendebla je ĉirkaŭ 1.000 frankoj, tute ne kalkulante, ke eĉ la Vatikana biblioteko estus nesufiĉe vasta por enteni tian belan libron.

Ĉu ne estos ridinde, se mi post tio aludas Esperanton? Mia najbaro trovis ĝin tiel facilega, ke li jam sciis ĝin, antaŭ ol oni ĝin elpensis. Kiam S-ro Biskvita ricevis en 1887 ĝian unuan lernolibreton, li estis mirigita, vidante ke D-ro Zamenhof kopiis liajn proprajn pensojn kaj sciojn, kaj li diris iom melankolie kaj senpripense: «Ho saĝa inter saĝuloj, glorinda inter gloruloj D-ro Zamenhof! Nur ĉar mi estis okupegata vi eldonis al la publiko, antaŭ ol mi, la artefaritan lingvon Esperanton. Kaj tial la homaro nur ŝuldas al vi tiun gravegan progreson. Nun mi sperte komprenas, kiel Newton kaj Leibniz povis samtempe esti elpensantoj de la plej altcela matematika eltrovo.»

La etimologio ŝuldas al mia najbaro tre gravan teorion pri la naturo de la vortoj. Laŭ ĝi ĉiuj vortoj klarigas per si mem sian sencecon kaj signifon kaj plej ofte siajn apartajn ecojn. Mi nur prezentos kelkajn ekzemplojn, en celo ne enuigi miajn legantojn.

La akrido ne povas esti ne malutila, ĉar kion bonan oni povas atendi de ido de akro?

Kio estas maro! Nur kolekto da *m*. Nu, atentu, ke ĉiuj ĝiaj ĉefaj ecoj komencas per tiu ĉi letero: ĝi estas maldolĉa, malkvietema, majesta, miljara, manĝema, meditiva, minacema, multvasta, moviĝema, mirinda, mistera, mola, monstra, mortiga, malsekiga, muĝema, murmurema, muta, malobeja, k. c. k. c.

Ĉu agito ne estas ricevo de ago?

Kial virinoj tiom multe amas ametojn? Ĉar ili havas aman profesion.

Atentu pri vorto bovo = B + V, ĉefliteroj de la montrita estaĵo, *Besto Vianda*, besto kies viando estas por ni la ĉefa afero.

Kaj por fini, ni esploru la nomon de nia kara lingvo. Ĉu vi kredas, ke la vera etimologio de Esperanto, estas *kiu esperas*? Ne, tio estas nur ia revaĵo: la praktika deveno kaj signifo de la vorto estas alia. Rimarku, ke ĝia unua silabo estas nur mallongigo de verbo *estas*, kaj vi tuj ektrovos ke Esperanto signifas etimologie *kiu estas peranto*. Kaj nu! ĉu ĝi ne estas peranto de la homa interkompreniĝo de la tutmonda kunfratiĝo!

Oni devas konfesi, ke Sinjoro Kerubeno estas plej originala en filozofiaj aferoj. Li obstine atakas ĉiujn sistemojn kaj skolojn. Nur li iom respektas filozofon Leibniz.—Kial?—Unue, ĉar li estis germano, due, ĉar li multe sciis pri matematikoj kaj trie—vi ne povas ĝin diveni, kara leganto—ĉar li estis elpensinto de monado. Pri la graveco de tiu eltrovo bonvolu nur rimarki ke se mono estas hodiaŭ la reĝo de la mondo, ĝia ado

estas sendube ankoraŭ pli multvalora kaj eksterordinara.

La astronomio estas tre ŝatata de mia najbaro malgraŭ ĝia *nokta regado*. Estas tre ĝojige audi Sinjoron Kerubenon parolantan pri la suno. Ĉar li estas tre purema, li ne povas toleri, ke iu havas sur si makulojn, eĉ se ĝi estas Lia Suna Moŝto, la astro de la tago. Tial li havas rimarkindan projekton—ekmiru, legantoj!—por forigi makulojn de la sunsurfaco, kvazaŭ ĝi estus ia malpura ganto aŭ eluzita pantalonon!

Sed kie plej hele brilas la talento de nia senkompara kuracisto, tio estas en la geografia scienco. Li scias parkere la nomojn de ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, la longecon kaj larĝecon de ĉiuj riveroj kaj la altecon de la montoj. Tamen, se vi demandas lin, ekzemple, pri la alteco de Mont Blanc', ne atendu, ke li respondos: 4.810 metroj. Tute ne, li diros al vi, ian alian nombron. Kaj se vi pro tio montros surprizon, li ridetante pravigos sin: «He, sinjoro, ĉu eble vi kredis, ke mi estas ia senkonsciencia verkisto, kiu kopias la dirojn de aliaj aŭtoroj? Se aliaj geografiistoj skribis ke Mont Blanc', havas alian altecon, ili estis pravaj, sed Dio min gardu priŝteli iliajn nombrojn! Al ĉiu, siaĵo!»

Mi plenigus dikan volumon, se mi devus elkalkuli ĉiujn konojn de S-ro. Kerubeno; tial mi finos la ĵenan skizon, konigante al miaj legantoj kelkajn kutimojn el lia intima vivo.

Li ne estas frumatena, nek amiko de ĉasado, kiel Don Kihoto. Li trovis, ke dormado estas plej dolĉa kaj agrabla stato kaj konstatis, ke ĉiu, kiu malmulte dormas, baldaŭ estas propraĵo de Morto, la reĝo de la profunda dormado.

Por matenmanĝi li preferas ĉokoladon densan kaj bongustan: li nomas la kafon, «aŭtoro de ĉiuj nervaj ekscitoj», kaj la lakton, «neapartigebla amiko de la ĉiam aparta solitero.»

La teon mi ne nomis, ĉar—pardonu miaj anglaj legantoj—li sentas por ĝi profundan malŝaton. «Kion oni povas atendi—li sprite diras—pri afero, kiu rimas kun hordeo, lakeo, pigneo, araneo, pereco, kaj aliaj malplaĉaj aŭ malgajaj vortoj?»

Neniam vi trovos lin en hejmo sen ĉapelo aŭ sen ĉapo. Pri tio li estas obstina strangulo. «Se vi volas havi bonajn ideojn en kapo, portu sur ĝi ion. Alie la pensoj forflugas kaj eksteren perdiĝas.»

Ne parolu al li pri la itala muziko. Li estas fervora Wagner'ano kaj trovas, ke Rossini, Bellini, kaj ceteraj muzikistoj, kies nomo finiĝas per *ini*, estis nur iaj malriĉaj diabloj, kiuj faris muzikon por infanoj.

Se vi demandas Sinjoron Kerubenon, kiajn virinojn li preferas, ĉu brunajn aŭ blondajn, li naive respondos al vi: «ambaŭ.» Li ne estas tro postulema: pri virinoj li nur deziras, ke ili estu junaj kaj belaj kaj stranga okazo! ĉe vino li ŝatas la malon, t. e. maljunecon.

Pri fiŝoj li havas strangan elekton:li nur amas tiujn, kiuj estas sendornaj, ekz. la ŝinkon.

Li havas tre delikatan aŭdon kaj multe ŝatas versofaradon. Tamen li senhonte konfesas, ke la versoj de Eneido kaj Iliado dormigas lin rapide. (Pardonu, legantoj, tian malrespektigon!)

Lin ravas la versoj klaraj, harmoniaj, kun vortoj bone aranĝitaj; kontraŭe, kiam li aŭdas verson, kie la silaboj, kiuj devus estis akcentitaj, ne havas akcenton, li indignas kaj forsendas ĝian aŭtoron al diablo.

Ekzemple, antaŭ kelkaj tagoj, mi legis al li versojon enpresitan en fama esperanta gazeto; kiam mi legis la verson:

Simile al napo *antaŭ* la azeno.*

li forte ekstremitis.

* Por esti verso, oni devas akcentigi *antaŭ* je la lasta silabo, kion ne permesas Esperanto.

Kiam mi daŭrigis:

Kaj nin ne allogas *orumita* pano
Nek *rostita* koko, nek ŝaŭma ĉampano
Ĉar *bonega* barĉo *zorge* preparita*

Sed la plej rimarkinda originalaĵo de S-ro Biskvitama estas la sekvanta, per kiu mi finos tiun ĉi longan tekston.

Li havas la mirindan kapablon diveni la aĝon de personoj; por tio li nur bezonas vidi la dentojn de iu kaj tuj li diras la ĝustan aĝon.

Tiu ĉi kapablo estas de li plej ofte uzata. Kiam li en vizito vidas ian fraŭlinon, li alsalutas ŝin dirante: «Ne ridetu, fraŭlino, ĉar se vi malfermas vian buŝeton, mi tuj scios pri via *aĝeto*»; kompreneble la fraŭlino tion aŭdinta, ne sole ekridetas, sed ekridegas, kaj nia eminentulo, aldiras ĝentilece: «Deksep jarojn kaj tri monatojn. Dio konservu ĉiam vin en tiu bela aĝo»

Sed malgraŭ, ke mi estas fervora admiranto de Sinjoro Biskvitama, por honoro la veron mi devas diri, ke pri aĝdiveno, li estas suĉinfano, kompare kun ia eminenta hispana Esperantisto, kin en raporto pri la Geneva kongreso, afable skribis koncerne D-ron Zamenhof. «Li ŝajnas kvindekjara—kvankam nur havas 48—» Ho kara samideano, daŭris ankoraŭ ĉe vi la emocio kaŭzita de interkonatiĝo kun nia Majstro, ĉar alie, vi estus pli ĝuste dirinta: «Li ŝajnas esti 49—jara, kaj tamen li nur havas 48 jarojn, 11 monatojn 30 ta-

* Por ke tiuj linioj sonu kiel versoj, oni devas elparoli *orŭmita*, *rŭstita*, *bŭnega*, *zorgé*.
li nerve sin levis el seĝo kaj diris kolere: «Ho mia amiko ĉesigu legadon, mi petas; alie mi tuj malsa niĝos.»

gojn kaj kelkajn centonojn da sekundo .. *laŭ la Green-
vich'a meridiano*.*



* Tiu ĉi humoraĵa artikolo verkita en amuza celo, ne volas ofendi iun ajn. Ĉar en ĝi estas aludoj, bonvolu la aluditoj min pardoni. Neniu kredis, ke mi volis moki lin je lia barbo (kompreneble en okazo se li havas ĝin, kio estas malofta ĉe Esperantistoj, ĉar nur S-ro Codorniu posedas la plej blankan, respektindan, longan kaj iam viditan barbon.)

LA FONOGRAFO

Tre varma diskutado estis en mia hejmo la tagon, kiam, post tre sukcesa ekzameno, mi ricevis la abituriantan diplomon.

Oni pritraktis la elekton de mia estonta profesio kaj ne granda interkonsento sin montris en la opinioj de miaj karaj ĉefparencoj.

Mia patro, generalo kaj provincestro de X..., deziris, ke mi fariĝu militisto. «Kredu al mi, miaj plej karaj,—li diris tre konvinke—ĝi estas plej brilanta kaj elektinda profesio. Li povos iam esti generalo, militafera ministro, kaj eble glora almlilitanto, se nur la sorto iom helpas. Vi ne trovos alian pli honestan, pli fierigan kaj estimindan profesion.»

«Tre bele, ke li fariĝu oficiro kaj revenu kripligite el ia terura milito—vive aldonis mia patrino—Ĉu vi forgesis la tempon, kiam vi estis vundita en batalo? Malbenitaj militoj! Nur mi scias la malĝojajn tiam pasigitajn tagojn! Ĉiam atendente ian malfeliĉon: ĉiunmomente kun larmoj en la okuloj, kun koro preskaŭ krevanta de premdoloro! Ne, ne, mia edzeto, ĉar ni nur havas unu filon, ni penu zorgi pri li plej ame: ni ne difinu lin por ia danĝera profesio. Almenaŭ, ke li restu apud ni dum niaj tagoj de maljuneco! Plej bone estus se li fariĝus advokato!

Kia bela profesio! Mi jam vidas lin flame kaj elokvente parolantan por ia senkulpa kondamnato: li altiras al si ĉies rigardojn kaj laŭdojn; la gazetoj favore raportos pri li unuanime starigante lin en la unuan

vicon de la eminentaj oratoroj kaj se la proceso estas grava, jen li ricevas grandan sumon, kiel rekompenco por sia brilanta kaj sukcesa pledado. Krom tio rimarku, ke en Hispanujo la advokateco trovas malfermitaj ĉiujn pordojn por suprensalti en la plej altajn societranĝojn kaj se mia filo estus advokato, li povus ja fariĝi talenta gazetisto, diplomatululo, aŭ deputato, poste ministro kaj eble eĉ Prezidanto de la Konsilanta Ministraro.»

«—Aŭ papo,—mokete kaj malvarme aldonis mia avo—Ne laciĝu vane en senutilaj diskutoj,—li daŭrigis—vi plej malerare agos decidante, ke mia nepeto ellernu la kuracan sciencon. Jen la vera, utilega, glora kaj elektinda profesio! Cetere rimarku, ke oni ne povas elekti okupadon pli noblan kaj homaman. Dediĉi sin al la zorgado de la homaro, por eltiri ĝin el la suferaj malsanoj! Kiom da malfeliĉoj evitas lerta kuracisto! Jen la plej bezona estaĵo por familio: kiam karulo estas malsana, ni vokas por helpo kuraciston, konfidante al lia povo, kiel ni petas la helpon de Dio kiam ni vidas alproksimiĝantan malfeliĉon. Kaj kiam respekton, kiam distingon, kiam atestimon oni ja difinas al bona kuracisto! Kredu al mi, miaj karaj; mia maljuneco kaj longa sperto permesas ke mi plej senerrare vin konsilu en tiu ĉi grava demando.»

Denove mia patro insistis, kaj reparolis mia patrino por defendi siajn ĵus diritajn opiniojn. Bedaŭrinde ke tie ne alestis aliaj miaj parencoj, ĉar sendube ili estus opiniintaj, ke mi devas fariĝi inĝeniero, aŭ arkitekturisto, aŭ eble horloĝvendisto.

Mi estis tiam dekkvarjara kaj pensis pri nenio serioza. La elekto de mia estonta profesio estis por mi nur sengrava afero. Kion mi, preskaŭ infano, povus ja opinii pri miaj estontaj studoj! Eĉ mi devas iom honte konfesi, ke en tiu tempo la libroj ne estis por mi tre logaj. Multe pli loga kaj ĉarma mi trovis ian belan knabinon, kiun mi plej varme amis kaj kiu ankaŭ

sentis por mi veran amon: Junulaj aferoj! Kiam ni devas pensi pri gravaj aferoj kaj devas nin okupi pri laboroj, kiuj certigos al ni estontan longedaŭran feliĉon, jen tiam ni celas nur al flankaj kaj malsatindaj okupoj!

Mi tion nun konfesas, sed tiam mi estis sensaĝe enamita kaj kredis, ke dum juneco sufiĉas sin dediĉi al amado kaj posedi belan fianĉinon. Kaj se miaj gepatroj estus min demandintaj: «Kian profesion vi preferas elekti?» Mi estus tuj sensanceliĝe respondinta: «edzeco». Feliĉe miaj gepatroj ne estis tiel malsaĝaj: ili bone pripensis la aferon kaj decidis, ke mi fariĝu advokato. Fine, mia patrino estis venkinta. En la hejmaj bataloj virinoj uzas trafajn armilojn kaj tre ofte altiras al si la venkon.

Kaj tiun saman jaron mi komencis studi en Universitato la unuan kurson pri leĝoscienco. Mi devis ellerni historion kaj filozofian traktaton: ambaŭ sciencoj estis por mi plej malamuzaj kaj enuigaj. Ĉiuj historiaj faktoj ŝajnis al mi seninteresaj kaj la subtilaj rezonadoj de la reĝa scienco nur efikis sur min per kapdoloroj. Al la diablo tiun longan serion da monarĥoj, kiuj naskiĝis, regis, gajnis aŭ perdis batalojn kaj poste mortis restigante unu aŭ multajn filojn, aŭ nenian! Ĉiam tiu sama raportado! Kaj por kio taŭgis scii, ĉu ia reĝo mortis en milito aŭ per ordinara malsano? Aŭ ĉu ia propositio estas aŭ ne ĝenerala? Multe pli min interesis la leteretoj de mia fianĉino. Kiam pro ia kaŭzo mi ne ricevis la kutiman ĉiutagan ambileton, mi komencis, sen helpo de la logiko, eltiri plej diversajn konkludojn pri ŝia silento. «Ĉu eble ŝi estas malsana? aŭ ĉesis min ami?» Tiaj demandoj kaj pensoj okupis min la tutan tagon, kaj dume la libroj kuŝis sur mia studotablo preskaŭ nelegitaj. La fino de la kurso alvenis kaj la ekzamenoj, kun siaj teruraj perspektivoj, kaptis min en la momento, kiam mi estis nur eller-

ninta kelkajn lecionojn de miaj libroj. Nur tiam mi komprenis mian teruran situacion kaj decidis rehavi la perditan tempon por sukcese min eltiri el la ekzamenoj. Sed ho ve! malgraŭ mia bonvolo, ne sufiĉis ellerni multajn horojn dum nur kelkaj tagoj por bone koni lecionaron, kiu postulis ok monatojn da diligenta studado! Tion ĉi mi tuj konstatis kaj sentis min sub la premo de granda malespero. Kion dirus miaj gepatroj, se mi bedaŭrinde malsukcesus? Mi estis tre juna kaj ankoraŭ ne komprenis, ke por ricevi belan rezulton en ekzamenoj, multe pli taŭgas efika rekomendo al la profesoroj, ol profunda konado de la lecionaroj. Kaj ĉar mia patro estis unu el la plej altrangaj personoj de la urbo la profesoroj min indulgis kaj mi sukcesis plej brile, kvazaŭ mi estus dum la tuta jaro ellerninta kun granda fervoreco. Kompreneble tiu neatendita rezultato multe min gajigis kaj mi tuj min pretigis plej amuze pasigi la someran libertempon dediĉante ĝin al mia fianĉino, al ekskursoj kaj promenadoj kun miaj samagaj kolegoj kaj al legado de nenia lernoteksta libro.

Miaj gepatroj, tre kontentigitaj pri mia studenta konduto, lasis min en plena libereco kaj eĉ helpis al miaj amuzoj. Preskaŭ ĉiuvespere mi iris kun ili al la teatro, kie bonega kantistaro prezentis zorge kaj arte la plej famajn tiam konatajn operojn. La unuan fojon kiam mi vidis teatran prezentadon mi ĝuis ravan feliĉon. Ŝajnis al mi, ke nova mondo aperas antaŭ miaj okuloj: mi povis figuri al mi nenion pli belan ol la muzikon kaj la teatron; kiom min logis la luksaj vestoj de la aktoroj, la bela voĉo de kantistoj, la harmonio de la muziko kaj ĉiuj eĉ plej malgravaj detaloj, kiujn mi povis rimarki! Mi sentis tuj nevenkeblan inklinon al kantado kaj grandan deziron instrui min pri tiu mirinda arto. Jen por tio mi sentis min preta ellerni plej fervore, obeante pri ĉio al la profesoro. Eĉ mi vidis min

bele vestitan sur teatro, kantantan kun majstra delikateco kaj altirantan al mi frenezan aplaudadon de la publiko. Kaj mi trovis en tio ĉi pli da merito kaj gloro, ol en ekzercado de mia estonta advokata profesio. En la flameco de mia revo mi petis miajn gepatrojn, ke mi dediĉu min al kantado por iam fariĝi glora tenoro. Miaj patroj ridis pri mia propono kaj tute ĝin malatentis. Mi preskaŭ ploris pro kolero, sed nenio helpis.

Mi daŭrigis lernante la legoscienccon, kiu de tago al tago ŝajnis al mi pli teda. Se almenaŭ la lernolibroj estus studeblaj per muziko, mi ilin rapide ellernus, ĉar por muzikaj verkoj mi havis eksterordinaran memorkapablon. Cion, kion mi aŭdis, mi preskaŭ sciis parkere kanti. Plej ofte en mia domo en la liberaj horoj mi kantadis muzikpecojn el la operoj, kiujn mi estis aŭdinta. Kaj ho malbeninda memamo! mi kredis, ke mi posedas plej belan voĉon, ke mi kantas plej delikate kaj agorde, kaj fine, ke mi povas superi la plej famajn tenorojn! Miaj amikoj estis iom kulpaj pri tio, ĉar ili laŭdis senĉese la meritojn de miaj kantoj.

Pasis ankaŭ la dua kurso de legoscienco kaj mi same sukcesis, kiel en la unua. Venis la libertempo kaj miaj gepatroj permesis al mi ĉiuspecajn amuzojn. Mi ankoraŭ amadis mian belan fianĉinon kaj nur atendis la finon de miaj studoj por edziĝi, sed mankis ankoraŭ por tio kvar jaroj! Mi preskaŭ frenezigiĝis pensante pri tia longa studado, sed la sorto estis por mi malfavora. Miaj gepatroj estis tiel obstinemaj!..

Guste en tiu somero oni komencis vendi en la urbo, kie mi loĝis, la unuajn ĵus elpensitajn fonografojn. Ili estis neperfektaj kaj tre karaj, sed mi sentis ekstreman deziron posedi unu el ili. Estis tiel ĉarme havi ilon, kiu obee ripetas la kanton de plej gloraj artistoj, kaj la elektitajn pecojn de plej majstra muziko! Mi min turnis al miaj gepatroj kun peto, ke ili aĉetu al mi fonografon kaj feliĉe tiun fojon mi trafis la celon, ĉar miaj

gepatroj rapidis akiri unu el la plej belaj fonografoj kondiĉe ke mi daŭrigos studante diligente mian leĝosciencan kursaron. Kompreneble mi tion estis promesinta, nur en la celo posedi tuj la ravantan min amuzilon.

Mi pasigis tre feliĉajn horojn kun la fonografo. Ĉiumomente ĝi estis funkcianta. Kelkafoje mi devis resti en la ĝardeno sola kun mia ilo, ĉar miaj gepatroj estis tion al mi ordoninta por eviti certan kapdoloron. Kaj tiu plezuro neniam min lacigis. Ju pli mi ĝin aŭdis, des pli mi ĝin ŝatis. Kiel mi nun rememoras la belajn horojn, kiujn mi pasigis en mia hejmo kune kun kelkaj amikoj aŭdante fonografon! Mi posedis tre belan kolekton da cilindroj kaj ne bezonis ripeti ofte la samajn kantojn.

Ian vesperon mi estis kun tri aŭ kvar universitataj kolegoj ĝuante la plezurojn de fonografa muziko, kiam unu el la aŭdantoj eldiris ideon, kiu vere min trafis. «Kial ni ne povos mem pretigi cilindrojn, kiuj resonigos niajn proprajn kantojn?» Jen penso, kiun mi trovis plej atentinda. Eĉ miaj kolegoj aldonis, ke estus tre bone, se mi posedus cilindrojn kun miaj kantoj, ĉar mia voĉo estas beleĝa. Tiu propono vere min logis kaj mi promesis instrui min pri pretigo de fonografaj cilindroj. Kaj efektive la sekvantan tagon mi iris al la fonografvendejo, kie mia patro estis aĉetinta mian fonografon kaj la tutan kolekton da cilindroj. Mi demandis la vendiston pri la procedo pretigi la cilindrojn por fonografo kaj li afable klarigis al mi ĉion. Mi aĉetis la por tio necesajn ilojn kaj multe da pretigotaj cilindroj kaj revenis hejmen por tuj efektivigi mian planon. La unuaj cilindroj, kiujn mi pretigis, entenis la voĉon de miaj gepatroj dum familia interparolado. Ili plej bone sukcesis kaj mia lerteco ricevis kiel rekompencon grandajn laŭdojn. Efektive la fonografo reproduktis plej fidele kaj klaraŭdeble la interparoladon, kaj aŭ-

dante la fonografon oni povis kredi, ke jen miaj ĝojtroj mem parolas.

Tre kontenta pri la bela rezultato de mia unua provo mi decidis pretigi cilindron por en ĝin fiksi mian kantan voĉon. Mi min enfermis en mian studoĉambron kaj tie tute sola min dediĉis al tiu grava demando. Kun plej granda zorgo mi preparis ĉion, kantis antaŭ la fonografo plej delikate kaj atente, kaj fine ricevis cilindron tute pretigitan. Jen mia deziro estis tuj efektivigota: mi brulis pro deziro aŭdi mian propran voĉon por juĝi mem pri ĝiaj meritoj. Tre emociaj estis por mi tiuj momentoj kaj mi preskaŭ kun timo sonigis la cilindron ĵus preparitan. Aŭdinte ĝin, mi sentis grandan disreviĝon: mi trovis mian voĉon malagrabla, senmerita, ordinara... Ĉu eble estas tia la voĉo, kiun ĉiuj miaj amikoj senĉese laŭdis, la voĉo pri kiu mi estis fondinta tiom da estontaj brilprojektoj, tiom da glorrevoj? Ĝi ne povis esti: sendube la fonografo min trompis, certe la cilindro estis mallerte preparita. Mi repetis la provon kaj pretigis novan cilindron. La rezultato estis tute sama, tio estas, mia voĉo daŭrigis estante malbona, malbela, kvazaŭ ĝi nur celus ĵeti min en profundan malesperon. Denove mi pretigis novajn cilindrojn, kaj ilin trovis mirinde samaj, kiel la antaŭaj. Parte kolera, parte malĝoja mi forlasis la laboron kaj sidigis sen kuraĝo, subpremita de malgajigaj impresoj. Ĉiuj miaj belaj revoj estis nur trompoj, ŝajnoj kaj malrealaĵoj! Mia plej kara idealo fariĝi eminenta kantisto estis tute ne efektivebla. Kiel prezenti min antaŭ la publiko kun tia kvazaŭbova voĉo, kiun la fonografo estis al mi elmontrinta? Neeble: adiaŭ mia gloro, mia famo, mia plej kara celo, mia estonta brilado en la teatra mondo! Jen ĉio malaperis, fordisiĝis, kiel nubeto de fumo kiun oni neniigas per simpla alblovo! Mi ne povis kredi al tia disreviĝo: ĉu eble mia aŭdo konfuzita povis min trompi kaj pre-

zenti al mi fiktivajon? Mi leviĝis nervekscita kaj preskaŭ ploranta. Mi alvokis miajn gepatrojn kaj sonigis antaŭ ili la novajn cilindrojn. Kun granda miro mi ricevis iliajn laŭdojn, ĉar ili trovis, ke la cilindroj reproduktas plej fidele mian voĉon. Mi aŭdis tion kun granda kortuŝo kaj malĝojo, kvazaŭ oni raportus al mi la plej funebran sciigon. Nenion dirinte al miaj gepatroj pri mia disreviĝo kaj malgajo, mi kuris en mian ĉambron kaj tie ploris longan tempon. Tute sola mi suferis la unuan gravan baton de la sorto, kiu volis per kruela frapo min eltiri el reva mondo, kien estis min kondukinta la malsaĝa flameco de juna kaj sensperta imagado.

De tiam mia karaktero profunde ŝanĝis: mia unua disreviĝo efikis sur min potence: ŝajnis, ke mi estis travivinta dek jarojn almenaŭ da instruplena spertado: mi komencis konsideri ĉion pli zorge, kredante ke ĉiuj objektoj kaj aferoj antaŭhavas por mi ian kaŝilon, kiu nur celas min logtrompi: mi trovis la legosciencon pli loga kaj interesa kaj studis plej diligente kaj serioze: miaj gepatroj vidis mian ŝanĝon kun tre granda surprizo, sed mi nenion rakontis al ili pri miaj forblovitaj glorrevoj.

Multaj jaroj estas de tiam jam pasintaj: mi nun estas advokato, al kiu la sorto multe helpis ĉar mia multenombra klientaro de tago al tago kreskas kaj liveras al mi tre grandan monprofiton. Bedaŭrinde miaj karaj gepatroj mortis antaŭ kelkaj jaroj. Mi vivas kun mia edzino—la fianĉino de mia studenta vivo—kaj havas tri belajn infanojn. Nenion mi povas deziri por esti feliĉa, ĉar mia hejmo estas vera paradizo.


Mi konservas ankoraŭ la fonografon, kiun miaj gepatroj aĉetis al mi antaŭ multaj jaroj kaj estis la kaŭzo de mia unua malĝojo. Estas vere ke nun la industrio liveras fonografojn multe pli perfektajn kaj belsonajn, sed mi preferas la mian, kiu estas pli mal-

multvalora sed kiu posedas por mi aliajn netroveblajn ecojn.

Tre ofte mi sonigas ĝin dum la vesperoj por amuziĝo. Mia edzineteto sidas apud mi kaj ĝin aŭdas atente. Kiam miaj cilindroj funkciadas mi mokeme diras al ŝi: «jen mia belega voĉo» kaj ŝi respondas al mi per naiiva kaj bonintenca ekridego. Mi kutimas ridi ankaŭ, sed pli ol unu fojon, mi trovis neinda je bonkora viro, ridi senkompate pri objekto, kiun mi devas respekti kaj danki, ĉar almenaŭ ĝi min eltiris el loga trompado en la tempo kiam mia malsaĝeco estis tre danĝera, kaj la fonografo plenumis la funkcion de bona konsilanto, kiu sciis konduki min en la saĝan vojon, en la vojon de la vero, la sola, kiu gvidas nin al la bono kaj feliĉo...



== VERSOJ ==



MEDITANTE...

Kiam en nokt' malluma nian aŭdon
Trafas malakra sono,
Kiun faras ŝovaĝaj marondegoj
Frapantaj sur la rokojn,
Io supernatura, plej mistera
Naskas ĉe nia koro,
Io, nian animon timiganta
Per sia grandiozo.
Kio ĝi estas? Kio povas naski
Tian teruran forton?
Ho ve, neniu povos ĝin klarigi,
Ĉar mankas al la homo
Potenco por malkovri plej kaŝitajn
Misterojn de la mondo.
Dio, saĝega, metis en naturon
Ilin en multa nombro,
Kaj vane ni penadas ilin koni
Per nia eta povo.
Ĉiam—atentu tion!—grandioza
Mister' al ni sin montros,
Kaj ĉion, kio ŝajnos grandioza,
Ia mistero kovros!

LA FEINOJ

~~~~~

Kiam nokto disvolvas sur teron  
La malluman mantelon de ombr',  
Mi ekvidas venantajn sur lagon  
La feinojn en aro sen nombr'.

Tie ili vagadas flugemaj  
Ĉirkaŭitaj de densa nebul',  
Sin amuzas per ara dancado  
Aŭ sin movas en gaja kunrul'.

Oni diras, ke venas sur teron  
La feinoj por ama konsol'...  
Mi suferas pro am' kaj neniam  
Ili venis al mi kun parol'.



# ADIAŬ! \*

*Al mia kara amiko S-ro J. Ellis.*

Mallonga sed multe malgaja jen vorto:  
Ni ĵus ĝin eldiris kaj funda ĉagreno  
Nin frapas en kor' ĉar kruela la sorto  
Fortiras karulon de ni, ĝis reveno.

Hodiaŭ klubet' «Kunfratiĝ'» en doloro  
Bedaŭras foreston de kara l'amiko,  
Neniam ekĉesos en ni rememoro  
Pri lia boneco kaj lerta kritiko.

Se nur pro mallonga foresto, kun forto  
Malĝojas la koro kaj ploras l' okuloj,  
Ni kiel suferos en horo de morto  
Adiaŭdirante al niaj karuloj!



---

\* Tiu ĉi versaĵo estis verkita, kiam S-ro J. Ellis petis eksigon el klubo «Kunfratiĝo», kies celo estas perfektigi siajn membrojn en la konado de Esperanto, per komuna korespondado kaj interkorektado de tekstoj, kiujn la anoj verkas kaj rondire sendas unu al alia.

# AMO PAŜTISTA



—Paŝtisteto  
Brutgardanta,  
Ĉu ĉi tie  
Promenanta  
Estis mia  
Rozali?  
—*Ŝi ne venis tien ĉi.*

—Najtingalo  
Dolĉekanta,  
Ĉu por aŭdi  
Vin, pepanta,  
Haltis mia  
Fianĉin?  
—*Ŝi ne haltis aarti min.*

—Nimfo bela  
Kaj, loganta  
Ĉu matene,  
Vagadanta,  
Al vi venis  
Fianĉin?  
—*Ŝi ne venis vidi min.*

—Rivereto  
Brufluanta,  
Vian akvon  
Rigardanta  
Estis mia  
Fianĉin'?'  
—*Mia akv' ne vidis ŝin.*

—Arbareto  
Brilverdanta,  
Ĉu sub arboj  
Ripozanta  
Estis mia  
Fianĉin'?'  
—*Mi ne ombroŝirmis ŝin.*

—Bela maro  
Ondaŝaumanta,  
Ĉu en bordo  
Sin bananta  
Estis mia  
Fianĉin'?'  
—*Mia ond' ne tuŝis ŝin.*

—Maljunulo  
Vojiranta,  
Ĉu renkontis  
Vin, pasanta,  
Mia bela  
Rozali'?'  
—*Kun pastisto,  
Promenanta,  
Pro feliĉo  
Radianta,  
Sur la vojo  
Iris ŝi.*

—Ho, paštisto  
Šin amanta  
Vi, feliča,  
Ĝojsaltanta,  
Iras apud fianĉin',  
Dum avide  
Deziranta,  
Mi, pro amo  
Sopiranta,  
Tute vane serĉas ŝin.





# LA MARO



Blua, kiel okul' de blondulino,  
Dolĉe bruanta, kiel flata vorto  
Kaj mola kiel man' de l'amatino,  
Vi logas al terura drona morto.

Malproksime de tero vi perfidas  
La ŝipojn englutotajn kise tuŝas,  
Kaj ve! l'estaĵoj, kiujn vi avidas,  
Mortintaj jam en vi sen tombo kuŝas!



# ŜANĜO POST EDZIĜO



Dum via fianĉeco plej ameme  
Vi ĉiam serĉis min,  
Kaj senĉese petadis mil karesojn  
De via fianĉin'!

Hodiaŭ ni, geedzoj, kune vivas,  
Kaj ho terura sort'!  
Neniam vi, sendanka, min karesas  
Eĉ nur per ama vort'!



## SENPATRIĜA INFANO

Sur la varma beleta lulilo  
Infanet' sin agitas ploranta,  
Kaj manetojn etendas peteme  
Patrinon serĉanta.

Estas vane, ke ĝi helpkriadas  
Atendante kareson de iu,  
Ĝia ploro perdiĝas eksteren  
Kaj venas neniu.

Kiel povas patrino restadi  
For de ĝi, dum suferas fileto?  
Ĉu ŝi povas alvokon malŝati  
De bela knabeto?

Tute ne, tute ne, bedaŭrinde,  
Jen ĵus mortis patrin' senkonsola  
Kaj restigis l' amatan fileton  
Senhelpa, tutsola...



# EN ĈERKO

---

En ĉerko sur tablo tombeja ripozas  
De nur kelkaj horoj mortinta virin'  
Atendas ŝi tie nur esti lasata  
En tombon por pace kuŝadi sen fin'.

Belega ŝi estas kaj malgraŭ paleco  
De morto lokita sur ŝia vizaĝ',  
Tuj oni divenas, ke vivo foriris  
Dum ĉarma floreco en juna la aĝ'.

La lipoj en dolĉa rideto sin montras,  
L' okuloj fermitaj en dorma trankvil'  
La frunto majesta, la vangoj belformaj,  
Pendantaj la haroj de ora fortbril'.

La iam premantaj per dolĉa surtuŝo  
Manetoj ripozas en pia kunmet'  
Sur brust' delikata, nun tute senmova  
Kaj iam frapata per ama tremet'.

Kaj ŝi ja ne vivas! Belec', amo, virto,  
Juneco, ĉarmaro, gajeco de l' kor',  
Jen ĉio pereis, la mort' senkompata  
Avide detruis kum krima fervor'.


Mortinte, ŝi karajn gepatrojn restigis  
Fratetojn, parencojn, kaj bela junul'  
Sin amis en vivo kaj ploras funebre  
La perdon ĉiaman de sia kunul'.

Ho morto terura, glacia, senkora,  
Por kio karuloj rabitaj de vi  
Nin tute forlasas? Ĉu ili neniam  
Revenos en mondon por vivi kun ni?

Perditaj por ĉiam? Nenio post tombo?  
Vivado nur povas troviĝi sur ter'?  
Mortinte, ni sole disiĝas en polvon?  
Ho ve, kia granda terura mister'!

. . . . .  
. . . . .  
. . . . .

En ĉerko sur tablo tombeja ripozas  
De nur kelkaj horoj mortinta virin'.  
La nokto jam kovris la teron per ombroj  
Kaj regas profunda silento sen fin'...



## BELA ESTAS LA MAR'!...

Se estas kvieta la mar' kaj pentriĝas  
Sur ĝia supraĵ' la bluaĵo ĉiela,  
Ni diras aŭdante la dolĉan murmuron  
De l'ondoj: nun estas la maro tre bela!

Sed kiam ventego la maron agitas  
Kaj ĝi brueganta, sovaĝa, kruela,  
Ĉielen altiĝas kaj ĉion detruas,  
Ho tiam... ĝi estas ankoraŭ pli bela!



## Al rozo kreskanta apud tombo

---

Ho rozo plej bela  
Sin montris kruela  
Por vi ja la sort'!  
Vi nur elnaskiĝis  
Kaj tuj renkontiĝis  
Kun kapta la mort'.

Se mi vin deprenas  
La mort' al vi venas  
Kun nepra aktiv'.  
Kaj, tamen, restante  
Vi vivos konstante  
En mondo sen viv'!



## LA SEKAJ FOLIOJ



Falinte de l' arbo, la sekaj folioj  
Kuŝadas senmovaj sur ter',  
Sed forte skuataj, jen for sen celado  
Per blov' ilin portas aer'.

Tutsame plej belaj la kar' iluzioj  
Faladis jam el mia kor',  
Kaj vent' de l' pasio ja ilin sendese  
Elskuas kun ŝira dolor'.






## LA LASTA AMJURO



En bela vespero de varma somero  
Lastfoje ŝi restis kun mi;  
Tuj forveturonte, adiaŭ dironte,  
Mi juris amadon al ŝi.

Sincere el koro, kun vera doloro  
Ŝi ploris pro tuja forir',  
Kaj je la ĉielo, pri ama fidelo  
Ŝi juris al mi kun sopir'.

Vojaĝon finante, mi koravidante,  
Rapidis al mia knabin',  
Sed, ho vea sorto! kruela la morto  
Jam estis rabinta for ŝin!



# AL HARPO

*(El G. A. Becquer)*

En salon' ĉe l' angulo malluma,  
Forgesita kredeble de l' mastro,  
Silentema kaj plena je polvo,  
Kuŝadis jen harpo.

Kiom multe da notoj dormadis  
Sur kordar', kiel birdo sur branĉo,  
Atendante lertegan sonigon  
De blanka la mano!

Ho ve! kiom da fojoj genio  
En animá sinkaŝa dormado,  
Nur atendas la voĉon Lazaran  
Ordonontan: «Leviĝon, formarŝon!»



# La lasta folio

---

## I

En fin', preferloke, post ĉiu kolego,  
La lasta folio de verko prezentas  
Maldaŭron de bela kortuŝa tralego,  
Aŭ fia rakont', kiu multe turmentas.  
Sed ĉiam l' aŭtoro, kun kaŝa petego,  
La karajn legantojn el kor' komplimentas  
Kaj diras adiaŭ ne sen emocio,  
Per lasta folio.

## II

Somer' preterpasis. Revenas aŭtuno,  
Naturo nudigás je bela verdeco,  
Komencas nevarme briladi la suno,  
La nuboj disigás per ofta pluveco.  
Ho, kiel malgaje jen arboj sub luno  
Vidigás flavetaj en branĉa nudeco!  
De vent' forportata ruliĝas sur ĉio,  
La lasta folio.

## III

Monato decembro: tag' tridekunua;  
Jen unu tutjaro rapide fluginta,  
Por homoj feliĉaj ĝi ŝajnis plengua,  
Aliaj ĝemante ĝin trovis pasinta.  
Sur mur' kalendaro pendanta, senbrua,  
Elvekas malgajon pri io mortinta,  
Deprenon atendas kun rezignacio  
La lasta folio.

IV

Se ĉiuj animaj pasioj nur estas  
Folioj falantaj en ĉiu momento,  
Folioj, post kiuj, memor' sole restas,  
Folioj ŝiritaj de viva la vento,  
Ho, penu, ke ĉiam, ĉu koro ĝojfestas,  
Ĉu koro doloras pro ia premsento,  
Ja restu plej kara, kun rav-iluzio,  
La lasta folio.



# LA ROZETO



Ia bela rozeto kreskadis  
En granda ĝarden',  
Ĉiam ĉarma, modesta kaj ĝoja  
Vivadis sen pen'.

Kiam plenan aĝecon ĝi havis  
Apuda diant'  
Sian amon al ĝi petproponis  
Kun loga konstant'

La rozet' ĝin akceptis plej rave,  
Kun dolĉa ridet'...  
Sed belega knabino tuj venis  
Kaj ornamo de nigra hararo  
Fariĝis rozet'.



Tiel same la revoj en mondo  
Pli kreskas kaj pli  
Ĝis alvenas kruela realo,  
Kiu ilin renversas senkora  
Mokante pri ni.



# HUMORAĴOJ

---

(*El Campoamor*)

Laŭ kredas geamantoj,  
Floroj valoras pli, ol diamantoj;  
Sed kiam ĉesis am' ili konstatas,  
Ke multe pli la diamantojn ŝatas.

\*  
\* \*

Pli ol demando tera,  
Estas virino nur demand' ĉiela.



## KORENUĜ

---

(*El Campoamor*)

Sen korama raveco  
Izol' ermita estas terureco,  
Sed ankoraŭ pli estas timiganta  
Izoleco ĉe geo kunvivanta!

---

## OFTA MALSANO

---

(*El Campoamor*)

—Kia malsan' forprenis ŝian vivon?  
Rozaŭro pridemandis senkonsola,  
—Ŝi mortis pro defal'. doktoro diris  
—Sed de kie? —Ŝi falis de l' ĉielo.



## **Kiam alvenos...?**

---

La bela kaj gracia junulino  
Revante pli kaj pli  
Pri la fianĉ', demandas sin plej ofte:  
«Kiam alvenos li?»

La junedzin' ankoraŭ seninfana  
Pensante pli kaj pli  
Pri ĉarma knabo sin demandas ĉiam:  
«Kiam alvenos ĝi?»

Bela vidvin', kiu edzecajn ĉarmojn  
Memoras ĉiam pli,  
Demandas sin kun rav' pri nova edzo  
«Kiam alvenos li?»

Kaj mi, havanta bopatrinnon tigran,  
Demandas ĉiam pli,  
Pensante pri diabl', ŝin forprenonta:  
«Kiam alvenos ĝi?»





## REDONOTA KISO



Vi estis prava, jes, indignegante  
Ĉar en konversaci'  
Mi profitis solecon vin kisante  
En ama senkonsci'.

Via koler' feliĉe tuj foriris  
Dank' al galanteri',  
«Vi ne volas la kison?—mi nur diris—  
Redonu ĝin al mi!»



# MALPRAVA PLENDO

---

Sendankaj ĉiam kaj neniam sataj,  
La homoj sen esper'  
Ofte plendas, ke vintr' estas tre frosta,  
'Tre varma la somer'.

Se, tamen, la frostec' estus somera,  
Kaj en vintro la varm'...  
Ni tute same plendus pri la afero.  
Ho loga plenda ĉarm'!



# HO KIEL BELEGE!...

---

*Al mia kara amiko, kapitano Baigorri.*

La sun' elleviĝas kaj sendas al tero  
Orlumajn radiojn en tag' de somero.  
La floroj odore l' aeron parfumas,  
La birdoj pepadas, insektoj elzumas.

De tre malproksime rivero plaŭdadas  
Kaj dolĉe, mistere l' arbaro bruadas.  
Jen ĉio vekigās, eterna Naturo  
Al ĉiuj sin montras en loga plezuro.

Ho ravaj momentoj, ho viv' sur kamparo  
Ĉarmanta, supera al ĉi' sen komparo!  
Sed kiel belege dum tiuj momentoj...  
Profunde dormadi en lit' sen turmentoj!



## *La senkonsola vidvo*

---


«Por mi neebla estas jam feliĉo!  
La morto sen kompat'  
Forprenis mian karau edzineton  
Antaŭ unu monat'.

Sen amo ŝia, viv' estas turmento,  
Tutsola sur la ter',  
Plorantan ĉiam pro dolor' korprema  
min tenas la sufer'!»

Tiel, ĝeme parolis ia vidvo  
Ĉe la tomb' de edzin',  
Kaj ho mister'! li estis mortiginta  
Bastonbatade ŝin!!!




## FELIĈO EN SONGŬO



Kiel bela kaj ĉarma ŝi vidiĝis,  
Kiel dolĉa rigard' en la okulo,  
Kiam ŝi per mallaŭta voĉo diris:  
«Mi amas vin, nur vin mia karulo.»

Ŝia buŝet' promesis mil karesojn,  
La vangoj per ruĝiĝ' al fajr' similis,  
Ŝia brusto movadis sin tremete,  
Dum la tuta vizaĝ' per ĝojo brilis.

Blinde pro am' mi premis ŝiajn manojn  
Kaj komencis ŝin kisi kun ekscito,  
Sed tiom ekkliniĝis mia kapo...  
Ke mi falis surteren el la lito!



# ENHAVO

|                                              |    |
|----------------------------------------------|----|
| La Drakego de la Patriarko. . . . .          | 1  |
| La Gnomo (legendo el G. A. Becquer). . . . . | 9  |
| Edziĝo malaranĝita. . . . .                  | 27 |
| La Pentristo. . . . .                        | 69 |
| Mia najbaro.. . . .                          | 79 |
| La fonografo. . . . .                        | 87 |

# VERSOJ

|                              |     |   |                          |     |
|------------------------------|-----|---|--------------------------|-----|
| Meditante.. . . .            | 99  | ↓ | Al harpo. . . . .        | 114 |
| La feinoj. . . . .           | 100 |   | La lasta folio.. . . .   | 115 |
| Adiaŭ! . . . . .             | 101 |   | La rozeto. . . . .       | 117 |
| Amo paŝtista.. . . .         | 102 |   | Humorajoj.. . . .        | 118 |
| La maro. . . . .             | 105 |   | Korenua. . . . .         | 119 |
| Ŝanĝo post edziĝo. . . . .   | 106 |   | Ofta malsano.. . . .     | 119 |
| Senpantrina infano.. . . .   | 107 |   | Kiam alvenos...? . . .   | 120 |
| En ĉerko. . . . .            | 108 |   | Redonota kiso. . . . .   | 121 |
| Bela estas la mar'!... . . . | 110 |   | Malprava plendo. . . . . | 122 |
| Al rozo kreskanta            |     |   | Ho kiel beleĝe...! . . . | 123 |
| apud tombo. . . . .          | 111 |   | La senkonsola vid-       |     |
| La sekaj folioj. . . . .     | 112 |   | vo.. . . .               | 124 |
| La lasta amjuro.. . . .      | 113 | ↑ | Feliĉo en sonĝo.. . . .  | 125 |